3-a Jaro. N-o 129—130 APERAS SEMAJNE 19. Marto 1927



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktanto: E. LANTY
14, Avenue de Corbéra, Paris-XIIe

Sidejo de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, Rue Boyer, Paris-XXe

Administranto: R. LERCHNER
Colmstrasse 1, Leipzig O 27

NI FARU NOVAN PAŜON ANTAŬEN!

Antaŭ 2 monatoj, en la numero 119—120 de "S-ulo" ni sciigis pri la malbona stato de nia kaso, kaŭzita de neantaŭvidebla revaloriĝo de l' franko. Ni devis dum kelka tempo limigi ĉiurilate la elspezojn kaj eĉ voki al la SAT-anaro, ke ĝi helpu en la reekvilibrigo de nia buĝeto per mondonacoj.

Hodiaŭ kontente ni sciigas, ke pagitaj estas niaj ŝuldoj. Denove ekvilibras nia buĝeto... Ne vane ni alvokis: preskaŭ 200 dolaroj trafis en la administrejon.

Ĉu tio ne pruvas okulfrape, ke nia popoleto estas riĉa... je malavaremo, entuziasmo kaj fido en la estonto de la SAT-movado? Kiam inter la vicoj de simplaj laboristoj, de malriĉaj proletoj kuŝas tia fervoro kaj sindonemo, ĉia pesimismo devas esti for, ĉia espero estas prava, ĉia kuraĝa antaŭenirado permesebla.

Tial ni decidis fari novan paŝon antaŭen, t. e. starigi novan entreprenon, kiu firmigos kaj profitigos nian movadon.

Ni aludas pri starigo de propra presejo.

Jam de kelka tempo ni ja okupiĝas pri tio. Per cirkuleroj ni petis la opinion de la S-K-anoj kaj de kelkaj aktivuloj el nia movado. Hodiaŭ ni jam povas sciigi, ke la granda plimulto aprobas kaj konsilas, ke ni efektivigu la projekton.

Sed ĉu denove ni petos al donacemo de la membroj? Ne. Tute ne. Ne decus trouzi la malavaremon de la SAT-anaro. Ni volas male, ke la entrepreno estu profitdona al la kunhelpantoj. Ni vokas al K-doj, kiuj havas en kapitalistaj entreprenoj kelkajn akciojn, en ŝparkasoj kelkajn ŝparaĵojn. Ni ne dubas, ke tiuj SAT-anoj preferos pruntedoni al SAT ol al ia ŝtata aŭ kapitalista entrepreno.

Malprofiton ili ja ne havas, ĉar ni pagos 8-procentan *renton.*

Por ekfunkciigi la presejon, ni bezonas proksimume 3000 dolarojn aŭ 12 000 germ. markojn. Ni ja devas pagi tuj nur la trionon el la prezo de la maŝinoj. La du aliaj trionoj estas pagendaj en la daŭro de du jaroj.

K-do G. (Germanio) promesis disponi al nia kaso 1000 markojn. Ni scias, ke aliaj K-doj, jam informitaj pri nia projekto, pretas pruntedoni atentindajn sumetojn. Ni nun ja povas kalkuli je tuja prunto de 3000 markoj. Ĉu ne troviĝos inter la 6000 SAT-anoj, sufiĉe da K-doj por pruntedoni la 9000 aliajn markojn necesajn por ekfunkciigi la entreprenon?

Ni estas konvinkitaj, ke jes. Kiu ne povas aĉeti unu dolaran akcion, tiu kuniĝu kun alia(j) K-do(j) por kolekti la monon. Ĉiu esperantista Grupo, ĉiu SAT-rondo aĉetu almenaŭ unu akcion. Ĉiu SAT-ano priparolu la aferon en sia medio kaj varbu akciulojn por la SAT-presejo.

Estas memkompreneble, ke laŭ la jura vidpunkto la entrepreno estos la propraĵo de SAT, kaj ĉiuj profitoj estas dediĉotaj al la propagando de la celoj de nia Asocio.

Ĉi tie ni ne povas doni detalajn informojn pri ĉio. Sed ni pretas respondi al ĉiu eventuala demando.

SAT ekzistas jam de sep jaroj. Ĉiu povis konvinkiĝi, ke ne senpripense kaj facilanime ni entreprenas ion. Ni ne faros longan pledon. La faktoj ja parolas sufiĉe elokvente.

Kiu volas sen ia malprofito helpi al nia movado, anstataŭ profitigi kapitalistajn entreprenojn, tiu senprokraste mendu akciojn al nia Administranto, Leipzig.

Ekzekutiva Komitato.

Lenin pri Sennaciismo

La vorton "internaciismo" ni tradukas je "sennaciismo", kiam ni volas substreki la sencon de ĝi, kiel ismo pri kunfluiĝo kaj neniiĝo de nacioj. Verdire, la vorto "internaciismo" alian sencon ne devus havi[1]). Sed laŭsenca signifo de la vorto estas pli vasta kaj tial sub ĝi povas sin kaŝi kaj sin kaŝas eĉ et-burĝaj anoj de simpla kunvivado de nacioj. Ekzemple, tiel faras ordinare et-burĝaj elementoj en kapitalistaj landoj. Kaj eĉ en Sovetio la samaj elementoj penas kaŝi sian naciismon en larĝa ejo de l' koncepto "internaciismo" kaj kelkiam eĉ kuraĝas atestigi Lenin'on.

Ĉi-sube ni penos per kelkaj mallongaj citoj memorigi la doktrinon de Lenin pri naciproblemo.

Lenin komprenas la koncepton "internaciismo", kiel "kunfluiĝon de ĉiuj nacioj en la plej supera unueco". Li diras:

"Marksismo eltiras anstataŭ ĉia naciismo — internaciismon, kunfluiĝon de ĉiuj nacioj en la plej supera unueco[2])".

Por noti, ke ĉi-tio estas ne simpla unueco en la senco de kunlaboro de nacioj en unu regno, Lenin substrekas: *"en la plej supera unueco"*. En alia loko Lenin al la koncepto "kunproksimiĝo de nacioj" kontraŭstarigas la koncepton "kunfluiĝo de nacioj", komprenigante la lastan, kiel "neniigon, dispartiĝecon de l' homaro per etaj regnoj kaj ĉiun apartiĝecon de nacioj". Jen la cito:

"La celo de l' socialismo estas ne nur neniigo dispartiĝecon de l' homaro per etaj regnoj kaj ĉiun apartiĝecon de nacioj, ne nur kunproksimiĝo de nacioj, sed ankaŭ ilia kunfluiĝo".

Do, laŭ opinio de Lenin "kunfluiĝo de nacioj" signifas neniiĝon de nacioj, formiĝon de sennacieca socio tutmonda.

En jena cito li montras, kiel okazos la "kunfluiĝo de nacioj", notante ĝian *neeviteblecon:*

"Simile al tio, kiel la homaro povas veni al neniigo de la klasoj nur per la transira periodo de diktatoreco de la subpremita klaso, simile al ĉi-tio ankaŭ al neevitebla kunfluiĝo de nacioj la homaro povas veni nur per la *transira periodo* de plena liberiĝo de ĉiuj subpremitaj nacioj, t. e. de ilia libero apartiĝi".

La notata ĉi-tie de Lenin transira periodo al kunfluiĝo de nacioj, tute jesigas la teorion de mondlingvanoj pri *helpa* karaktero de lingvo internacia por tiu transira periodo.

Tamen "la plena liberiĝo de nacioj" tute ne signifas "fiksi naciismon en ia, "laŭ justeco" limigita sfero, "konstitucie starigi" naciismon, disfakigi inter si firme kaj fortike ĉiujn naciojn... Ĉi-penso estas trae burĝa kaj trae mensoga".

Plue Lenin daŭrigas:

"La Proletaro povas subteni neniun fiksadon de naciismo, — kontraŭe, ĝi subtenas ĉion, helpantan al forfroto de naciaj diferencoj, al forfalo de naciaj interbariloj, ĉion, farantan ligojn inter nacioj pli kaj pli intensaj, ĉion, kondukantan al *kunfluiĝo de nacioj.* Agi alimaniere — signifas stari flanke de reakcia naciista filistreco ..."

En alia loko Lenin diras:

"La Proletaro ne nur ne prenas sur sin la taskon defendi la nacian evoluon de ĉiu nacio, sed male, ĝi avertas la amasojn sin gardi kontraŭ tiaj iluzioj, ... salutas ĉian asimiliĝon de nacioj, escepte la perfortan aŭ la sin apogantan je privilegioj."

Sed kiel aspektas de ĉi-vidpunkto federacio de popoloj?

"Konfeso de memapartiĝo (de nacioj) tute ne egalvaloras konfeson de federacio kiel principo. Oni povas esti firma kontraŭulo de la principo kaj adepto de demokratia centrismo, sed tamen preferi federacion ol nacian neegalrajtecon, kiel la solan vojon al plena demokratia centrismo. Pro ĉi vidpunkto, Marks, estante centristo, preferis eĉ federaciiĝon de Irlando kun Anglio ol perfortan subigon de Irlando al angloj."

Jen estas ĉeftrajte la doktrino de Lenin — la plej granda sennaciisto post Marks. *A. Tomo.*

---

[1]) Ni opinias male, ke la vorto *internaciismo* ne povas etimologie havi alian signifon ol tiun de sistemo celanta organizadi jure aŭ ekonomie la naciojn kaj ne kunfandigi ilin. Kredeble, pro manko en naciaj lingvoj de taŭga vorto por difini sennaciecan sistemon oni plilarĝigis la sencon de la vorto internaciismo.

Ĉi okaze ni notu, ke necesis la ekzisto de esperanto kaj de la laborista esperanta movado, t. e. SAT, por ebligi tiuteme plenan klarecon. — *Red.*

[2]) Ĉiuj citoj estas prenitaj el du verkoj de Lenin: "Kritikaj notoj pri nacia problemo" kaj "Socialista revolucio kaj la rajto de nacioj por memapartiĝo".

JE LA NOMO DE L' VIVO

Filozofi-Lirikaj fragmentoj

de E. Izgur

kun enkonduko de E. Lanty

antaŭparolo de N. Kruĉinin,

prezidanto de l' Tutukraina Asocio de Proletaj Verkistoj kaj prezidanto de la Tutukraina "Proletkult"

Enhavo: I. Prologo. — II. En Malproksimon. — III. Servado al la Morto. — IV. Religio. — V. Ribelo de l' konscio. — VI. Sur la vojo al venko. — VII. La venko. — Epilogo.

224 pĝ., 100 ilustraĵoj. Prezo: 2 g. mk. Bona papero, belą presado

Profitu la nunan favoran prezon. Ne prokrastu mendi la belegan volumon ĉe la Administracio de SAT:

R. LERCHNER, COLMSTRASSE 1, LEIPZIG-O 27

Antaŭenema Ĉinio

Forigo de analfabeteco

Laŭ iu artikolo de Gertrude Beasley en "The Daily Herald", dum la lastaj dek jaroj, alfabeteco en Ĉinio estis plivastigata de 2% ĝis 12%. Ĉi tio estas rezulto de la starigo de popularaj lernejoj, ankaŭ de vesper-kursoj, kie grandparte instruas senpage universitataj studentoj, post sia dumtaga laboro. La movado jam pliiĝis por enteni la kamparanojn, speciale en la provincoj sude de rivero Jangce, kie, aldone al leg- kaj skribado, la farmuloj studas terkulturajn kaj dommastrumajn metodojn. Ankaŭ ne estas forgesita politika propagando; la kursanoj ellernas la 3 ĉef-punktojn de la programo de San Jat Sen: 1. Forigo de alilanda regado, 2. Politika libereco por la popolo, 3. Ekonomia libereco por laboristoj kaj kamparanoj. Ĉi tiu laboro estas ligita kun la ordinara edukado en la unuagradaj lernejoj; da tiuj oni starigis dum la lastaj 5 jaroj ĉ. 40 000.



Moderna ĉinia junulino radie disaŭdigas ĉe l' Ŝanghaj-a stacio de l' Azia Radio-Kompanio.

Artefarita lingvo

Por ĉi tiu kontraŭ-analfabeteca movado, oni trovis necese, krei novan nacian lingvon, "pei-hua". Oni elektis la popularan dialekton "Mandarin", (kiun parolas, ĉu en ĝia pura ĉu en sub-dialekta formo, 70—80% el la popolo skribatan per la uniforma ĉinia maniero, kiu daŭris tra la tuta lando jam de antikvaj tempoj (vidu S-ulon, n-o 98—99). La profesoroj rekonstruis simpligitan skribad-bazon el nur kelkaj miloj da signoj, per kia signaro ili eblis esprimi ĉiujn ideojn kompreneble kaj koncize. Sed eĉ tiuj kelk-miloj da ideografiaĵoj sin montris troaj por la simpla lingvo instruota al laboristoj kaj kamparanoj. Tial, oni faris alian provon, kiun oni nomis: "La Mil-Ideografi-Movado". El tiu lingvo, laboristoj en la vesper-lernejoj ĉe Hankaŭ, ellernante ĉ. 10 ideografiaĵojn en tago, povas tiamaniere akiri scion pri la milo dum 4 monatoj. Ili

povas tiam legi la laboristajn ĵurnalojn kaj sciiĝi pri la ekonomia kaj politika situacio, kiel ĝi rilatas la Proletaron. La redaktoroj de tiuj ĵurnaloj bone plenumas sian taskon rilate al enlandaj kaj eksterlandaj aferoj kaj ofte modelas sian konsilon pri taktiko laŭ okcidentaj antaŭaĵoj.

Kristanoj laŭdas

El Uĉang[1]) venis letero de loka brita sekretario (-ino?) de Young Women's Christian Association (Kristana Asocio por Junaj Virinoj) al la ĉef-oficejo en London. La skribinto i. a. diris: "... Nenia dubo estas, ke aperas nova vivado



Unu moderna strato lasta tempo konstruita en Kantono

en Ĉinio. Oni ricevas impreson pri grandega kvanto da energio, ne altrudata de ekstere, sed kreskanta ĉe la ĉinoj mem, kiuj pensas kaj penadas memstare... La stratoj estas pli puraj ol antaŭe kaj oni plibonigas ĉion... Ĉiu apartenas iun unuiĝon... dom-servistoj antaŭ semajno minacis striki; rezultis altigo de salajroj, monsumo donenda finjare egalanta 1-monat-salajron kaj, okaze de maldungo, 3-monat-salajron. Ĉiu servisto devas esti dungata pere de l' unuiĝo.

Alia letero, kiu atingis la saman oficejon, de angla misiisto, entenis la esprimitan kredon, ke "la Nordo nepre" Kanton-aniĝos baldaŭ. Mi estas, kiel la plej antaŭenemaj personoj, simpatianto al tiu flanko. La intenca uzado de amasperforto estas malfeliĉa, sed tio kaj la uzado de l' ekonomia batalilo estas tute laŭnature ĉe malforta nacio..."

La ĉinoj nur atentu, ne akcepti, kune kun okcidentaj imitindaĵoj la mensogajn fabelojn de la kristanaj eklezioj; ili elektu la florojn kaj mortigu la serpenton. *E. K. L.*

1) En provinco Hu-pe.

AL NIAJ KUNLABORANTOJ!

Se vi volas trafe kunlabori al "S-ulo", verku mallongajn artikolojn.

Citu faktojn, sed tamen ne plenigu viajn skribaĵojn per troa abundo de statistikaj ciferoj.

Neniam forgesu, ke por nia gazeto, ju pli valoras artikolo, des pli ĝi malsimilas tiujn, kiuj aperas en la ĉiutagaj nacilingvaj ĵurnaloj.

EL TURKIO

Eŭropanoj, pensante pri ĉi tiu lando, kutime pentras al si fantazian bildon pri la popolo kaj ĝiaj moroj. Ili rememoras tiajn rakontetojn, kiaj "Aladino kaj lia lampo", "Blua-barbo" kaj aliaj fabeloj el "Mil kaj unu noktoj", kaj opinias, ke ĉiu virino estas enŝlosita en haremo el marmoro, gardata de eŭnukoj; sur strato ŝi portas dikan nigran vualon, por ke neniu eksterfamilia viro vidu ŝian vizaĝon. Ankaŭ ke ĉiu fenestro de domoj estas kovrita per krado, por ke neniu preterpasanto enrigardu ĉambrojn de virinoj. La imago vidas eksterordinaran bildon de viroj en ruĝaj fezoj, kiteloj divers-koloraj kaj multfaldaj pantolonoj meze de bela pejzaĝo, karesata de hele brilanta suno. Tio estis ĝusta pri tempo antaŭrevolucia. Tiam la sultano kaj riĉuloj havis siajn haremojn, kie loĝis iliaj multaj edzinoj. La antaŭaj haremoj de sultanoj estas grandegaj kaj belaj palacoj, kiuj ĝenerale staras apud paca kaj blua maro kun vidaĵo super la bela Bosforo.

La revolucio okazinta antaŭ tri jaroj ĉion ŝanĝis. En tiu revolucio la eŭrope edukitaj nobeloj kaptis la povon, detronigis la sultanon kaj elektis kiel prezidanton Mustafa Kemal paŝaon, kiu ĝis nun estras en Turkio. Por mense liberigi la nacion, la nova registaro dekretis, ke neniu virino plu portu sur vizaĝo vualon kaj, ke neniu viro portu ruĝan fezon, kiuj vestaĵoj de centjaroj estis ilia sankta vestaĵo de Islamo. Virinoj ĝojis liberiĝi de la sklaviga tradicio de vualportado. Nuntempe la antikvaj kutimoj tute malaperis kaj virino kaj viro vestas sin laŭ la plej nuna eŭropa modo.

La nova registaro ekiras la vojon de kapitalista Eŭropo. La fervojaro estis tre negranda. Mankis industrioj; preskaŭ ĉio bezonata, ekster agrikulturo kaj fruktoj, estis importata. Nuna registaro decidis, ke Turkio evoluu industrie. Tiucele la registaro prenis en siajn manojn ĉiujn ĉefajn industriojn kaj vendis monopolojn al diverslandaj kapitalistoj por venigi novan kapitalon en la landon per kiu ĝi konstruas novajn fervojojn kaj subvencias aliajn urĝe necesajn sociajn entreprenojn. Do, la registaro faras sian eblon por ke en la lando estu produktata per fremda kapitalo ĉio, kio estas bezonata kaj ĉiel helpas al kapitalistoj starigi industriojn. La popolo estas tre malriĉa kaj vivas mizere. Eble post starigo de enlandaj industrioj la homoj ĝenerale pliriĉiĝos.

Nenia societo aŭ organizo povas ekzisti sen permeso de polico. Tute ne ekzistas metiunuiĝo kaj pro severa puno nenia proleta organizo estas ebla. Industria Proletaro ankoraŭ ne ekzistas ĉi tie, ĉar ne estis fabrikoj, sed baldaŭ estos multaj. Ĉi tie la proletoj estas senlaboruloj, vendistoj sur stratoj, aŭ laboristoj en malgrandaj manlaboraj entreprenoj.

Nenia statistiko ekzistas por sciigi al ni la nombron da senlaboruloj, sed ĝi estas tre granda. Ĉar ne estas deviga asekurado, neniu laboristo ricevas ian subvencion pro senlaboreco, malsaneco, ktp., do ĉiu devas iel barakti por havigi al si panon, ŝirmon ktp.

Preskaŭ ĉiu vivas per komerco — aĉetado kaj vendado. Ĉiutage miloj da homoj trairas la stratojn kun grandaj korboj surŝultre; en unuj troviĝas legomoj, en aliaj oranĝoj, aliaj enhavas sukeraĵon, aliaj kukojn ktp. Oni ne povas imagi, ke ili sukcesas fari sufiĉe da profito por vivi; kompreneble, ili ne vivas, sed nur ekzistas; ĉar almozpetado estas severe malpermesata, la homoj devas fari ion por montri ke ili laboras.

Pro manko de metiaj aŭ aliaj proletaj unuiĝoj por gardi la interesojn de laboristoj estas granda interluktado por havigi laboron kaj proletoj malhelpas unu la alian, laborante por tre malmulte da salajro. La entreprenoj estas malgrandaj, kutime estro kun unu metiisto. Metiistoj ĝenerale ricevas de 100 ĝis 120 piastrojn tage, specialistoj de 120 ĝis 150 piastroj. (960 piastroj = unu funton sterlingan.) Nemetiistoj laboras 12 ĝis 14 horojn tage kaj ricevas 3000 ĝis 4000 piastrojn monate kaj vi vidos ilian mizeran staton, komparinte la prezojn de manĝaĵoj. Komizoj, en oficejoj, kiuj kapablas paroli 5 aŭ 6 lingvojn ricevas:

	piastrojn monate
Junuloj ĝis 20-jaraj	200— 3000
Aliaj pli aĝaj	3000— 6000
Ĉefaj komizoj	6000—10000
Direktantoj	10000—15000

(196 piastroj = unu dolaron)

La meza salajro de laboristoj estas 4000 piastrojn monate. Kosto de vivado multe pli altiĝis depost kiam la registaro vendas monopolojn al kapitalistaj kompanioj. La nunaj (februaro 1927) prezoj estas:

		piastroj
Pano (1000 gramoj)		15½
Butero (oka = 1280 gramoj)		360—400
(Margarino ne estas vendata.)		
Viando (oka = 1280 gramoj)		80
Sukero	„	64
Terpomoj	„	13
Rizo	„	50
Faruno	„	36—46
Teo	„	500
Ovoj, po		5½
Oranĝoj, meza		4
Lakto, litro		35
Oleo (petrolo), litro		17
Paro da botoj plej malkara .		500
Ĉapelo, meza kvalito . . .		675
Figoj, sekigitaj (oka) . . .		60
Daktiloj (oka)		35

Aldonu imposton al supraj prezoj 2½ piastroj por ĉiu 100 piastroj.

En la tempo de sultanoj estis la kutimo ĉe polico, poŝtistoj kaj oficistoj en urbaj kaj registaraj oficoj pligrandigi sian mizeran salajron per bakŝiŝo. La registaro malpermesas la akcepton de bakŝiŝo kaj persekutas pro tio; tamen, pro la malaltaj salajroj kelkaj oficistoj

atendas donacon laŭ la malnova kutimo, kiu estas tre ĝena afero por la publiko. Se vi ne donas bakŝiŝon, la oficistoj, laŭ okazo, ĝenas vin.

Ne estas krizo por trovi loĝejon en Konstantinoplo. Pro revolucio multaj grekoj forlasis la urbon. Ĉambro kostas 500 ĝis 1000 piastrojn monate.

En Angora, la nuna ĉefurbo, loĝejoj ne estas troveblaj pro tio, ke la oficistaro forveturis tien, por okupi ŝtatajn oficojn.

E. E. Yelland.



Salajroj de laboristoj en Estonio

Oni scias, ke en multaj eŭropaj landoj la salajroj de l'Laboristaro estas malaltaj. Estonio tiurilate estas inter tiaj landoj. Estas ankaŭ granda elcento da senlaboruloj ricevantaj neniun subtenon. Por senlaboruloj oni vintre aranĝas iajn komunajn laborojn, kiel strat-riparadon kaj konstruadon; sed tiu laboro ne sufiĉas por ĉiuj kaj unuavice estas akceptataj personoj kun familio aŭ en eksterordinare mizera stato.

En Tallinn estas kelkaj grandaj fabrikoj, kiel ŝip- kaj vagonkonstruejoj, kiuj estis starigataj laŭ la bezono de Granda Rusio. En ĉiu el ili antaŭe bruis la laboro de kelkmiloj da laboristoj, sed nun, post kiam Estonio fariĝis "sendependa" lando, la grandaj fabrikoj malpleniĝis. Ili ankoraŭ nur vegetas, kelkaj eĉ estingiĝis kaj neniu scias la rimedon, kiu povus ilin veki al nova vivo.

Jen kelkaj faktoj pri mezaj salajroj laŭ statistiko farita en junio 1926, pri ĉiaj fakoj de industrio en privataj entreprenoj, kie laboris minimume 20 homoj:

Inter viroj, kiuj laboris en presindustrio, vestaĵ-pretigado, konstrulaboro, ledindustrio, elektro kaj gas-fabrikoj, metalindustrio, kemi- nutraĵ- kaj trinkaĵ-industrioj, paper- kaj lignaj fabrikoj, cementbrik- kaj ŝtonindustrioj, minoj, tekstindustrio kaj purigadlaboro, la meza tagsalajro estis 224 mk. kaj la procento da laboristoj ricevantaj malpli ol 200 mk. tage estis 33,3.

Inter virinoj, laborantaj en la supremenciitaj industrioj, la meza tag-salajro estis 141 mk. kaj la procento da laboristinoj ricevantaj malpli ol 200 mk. estis 87,6.

Notinde estas, ke rilate la altecon de salajro, en la unua vico staras fakoj de industrio, kie oni laboras por la enlanda merkato, dum la fakoj produktantaj por eksporto, kiel papero, ligno, mineraloj, cemento kaj teksaĵo, staras pli sube. En ŝtataj entreprenoj la salajroj estas iom pli altaj; ekz. en la fervojaj fabrikoj, la meza salajro estis por viroj 348 mk. por tago kaj por virinoj 179 mk., dum en privataj entreprenoj ĝi estis respektive 259 kaj 161.

Tamen efektive la salajroj estis iom pli altaj ol montritaj pli supre, ĉar preskaŭ ĉiuj laboras pli ol la ordinarajn laborhorojn. En junio 1926, la procento da tiuj krom-horoj estis 6,5 kaj la procento da laboristoj kiuj ilin laboris 35,7.

Jen la prezoj de kelkaj el la pli gravaj vivbezonaĵoj:

Sekala pano, por klgr.	20 mk.
Blanka tritika pano, por klgr.	40—48 mk.
Terpomoj, por klgr.	5 mk.
Butero, por klgr..	250—275 mk.
Sukero, por klgr.	50 mk.
Viando (porka), por klgr.	100—140 mk.
Lakto, por litro	18 mk.
Ŝuoj, por paro	1300—1500 mk.
Kostumo	5000—8000 mk.
Loĝejo, por unu ĉambro kaj kuirejeto por unu monato	1000—1500 mk.

Rilate lupagon, mi devas aldoni, ke la citita sumo estas la minimumo, pagata de personoj delonge loĝantaj en la sama domo, kiun la leĝo protektas; aliaj pagas 2000—3000 mk. monate, rezulte, multaj personoj estas devigataj loĝi kune por povi pagi la altan sumon.

Laŭ "Uhendus" kompilis J. Vahtkerl.



LETERO EL BULGARIO

La proceso kontraŭ la "Komsomol"-anoj en Pleven

Dum aŭtuno, pasintan jaron, en multaj bulgariaj urboj, estis arestataj "Komsomol"-anoj[1]). Ankaŭ en Pleven oni arestis 9 personojn — gimnazianoj kaj laboristoj.

La 1-an de februaro, estis legata la verdikto de l' tribunalo. Laŭ ĝi estis punataj per 5-jara malliberigo, 3 komsomolanoj; per 3-jara malliberigo, 2 komsomolanoj (ankoraŭ ne-plenaĝaj); kaj la restintaj 4 estis senkulpigataj. Ĉiu punato devas pagi al la ŝtato 50 000 levojn (proksimume 1500 ormarkoj).

Estas do 9 viktimoj pluaj el tiu longa vico da junuloj kaj plenaĝuloj, kiu ĉiutage pligrandiĝas kaj plenigas la malliberejojn.

De junio 1923 ĝis nun, la procesoj kontraŭ neniel kulpaj laboristoj, ne ĉesas. Tio estas la fruktaro de la faŝista diktaturo de la "Demokratia Konkordo" kaj ties drakona 333D (zakon za zaŝtita darĵavata — leĝo por defendo de l' ŝtato). La diroj de la juĝatoj kaj de la atestantoj pruvis, ke tiuj junuloj estis batataj ĝismorte de agentoj de la "Publika asekurejo". La 10-a ano el la akuzitaro, Dimitr Totev, ĉe tiu "esploro" en la "Publika asekurejo", mortis pro la batado!

Post la tralego de la verdikto, ĉiuj akuzitoj ekkriis: "Tio estas faŝista juĝo!" La tribunala prezidanto trovis ĉi-tion kontraŭleĝa kaj minacis, ke, se ili ne neos siajn vortojn, ili trovos ion pli teruran. Responde, la junuloj kantis plenvoĉe la "Internacio'n". Pro tio, anstataŭ liberigi la senkulpigitojn, oni sendis ilin kun la aliaj en la malliberejon. Eble (ne eble, sed certe), okazos nova proceso pro ĉi-tiu "danĝera" afero — kantado de l' "Internacio"!

Balkanulo.

[1]) "Sennaciulo", n-o 108.

EL LITOVIO

La faŝista teroro, mortiginta la kvar senkulpajn homojn (vidu en "S-ulo", n-o 123—124), ĉirkaŭrigardis. La novaj regantoj opiniis, ke ili estas tute senrespondaj pri siaj agoj kontraŭ iu ajn. Ili eĉ ne konjektis, kio estas internacia laborista solidareco, kaj ekmiris, kiam en tuta Eŭropo okazis protest-manifestacioj, deklaroj kaj minacoj al la rompintoj de homaj rajtoj. Ili plendadis, en siaj gazetoj pri sia plenrajto ktp., sed fine devis decidi, ke pli bone estus, ne plu mortigi. Tamen, por ne montriĝi kiel timemuloj, ili kondamnas, ĉiam kondamnas, sed la "bonkora" prezidanto de l' Respubliko pardonas.

Jen novaj verdiktoj: La 2-an de februaro okazis milita juĝo en Panevezys. Oni juĝis 4 K-dojn el Birzai kaj 4 el Rokiŝkis. Oni verdiktis 1. al Birzanoj Aleksiunas, Kazakeviĉius kaj Struzas (esperantisto kaj SAT-ano) mortpunon (la prezidanto de l' Respubliko ŝanĝis la punon en dumvivan punlaboron) kaj al Turla, 12 jarojn da punlaboro; 2. al Rokiŝkianoj, A. Meimelis, dumvivan punlaboron, Kurklietis kaj Pupelis, po 15 jaroj kaj Gordonaiti, 6 jarojn da punlaboro.

La 5-an de februaro, milita juĝo en Kaŭnas juĝis 5 homojn, inter ili esp-iston kaj SAT-anon Lindas Adomauskas, al mortpuno (la prezidanto de l' Respubliko ŝanĝis la punon en 15 jarojn da punlaboro); kaj Eu. Vicas, Zel. Ŝvarcberg, P. Glovackas, post verdikto de mortpuno, ricevis mildigitan 15-jaran punlaboron. Pro kio oni kulpigis la homojn? Pro aparteno (ne-pruvita) al la neleĝa komunista partio.

Ĉu estas ankoraŭ eĉ ombro da libero por la litovia Proletaro? Ne. Ĉefe, proletoj ne rajtas paroli, nek skribi. Antaŭ la reĝim-ŝanĝo, ni havis belan areton da proletaj diverstendencaj gazetoj — 10 krom kelkaj neperiodaj. Nun restas nur 2 social-demokrataj — la semajna "Socialdemokrato" kaj monata "La Nova Epoko"; sed ili nenion aktualan povas publikigi, ĉar la cenzuro forstrekas kaj jam kelkfoje eliris "Socialdemokrato" kun anoncoj anstataŭ ĉefartikolo. En la provincoj oni ĉesigis eĉ la ne-socialistan gazeton "Siaulin Naujienos". Tio ne sufiĉis. La loĝantoj legas kelkajn eksterlandajn gazetojn kaj oni decidis ilin ne plu enlasi. Oni ne permesas enveni litovlingvajn gazetojn eldonitajn en Usono, eĉ la organojn de tieaj naciistoj kaj liberaluloj. Oni ankaŭ ne enlasas latvajn kaj germanajn gazetojn (ekz. "Bund", "Deutsche Arbeiter-Zeitung", "Freitschaft" ktp.). Ni SAT-anoj atendas, kiam ili ne plu enlasos nian "S-ulon"!

La novaj regantoj deklaris, ke ili ne persekutos nepolitikajn organizojn de laboristoj — kaj pasis nur monato, kiam ni vidas fermitaj 3 lab.-profunuiĝojn; unue, la profunuiĝo de fervojistaro, kun

4500 anoj, kies havaĵon oni konfiskis; due, tiu de la led-laboristoj, kun 700 anoj; trie, tiu de l' aŭto-kondukistoj kaj meĥanikistoj. Oni protestadas. Protestas la anglaj laboristoj, protestas la Amsterdama Internacio ĉe la Laboroficejo de la Ligo de Nacioj. Ne gravas por niaj regantoj, kiuj diras, ke la fermitaj unuiĝoj estas komunistaj, preparantaj revolucion. Ne utilas, se ili ankaŭ apartenas al la Amsterdama Internacio kaj estas gvidataj de social-demokratoj. La nuligon de l' prof-unuiĝoj profitas la labordonantoj por atakoj kontraŭ la laboristoj. Ankaŭ la ne-fermitaj unuiĝoj ne havas plenan agadrajton[1]).

Estas ĝenata ankaŭ la agado de la social-demokratoj. En Rokiŝkis, Vilkaviŝkis, sen ia preteksto, oni malpermesis kunvenojn de la partio kaj de la soc.-dem. junularo, kaj en aliaj lokoj oni eĉ malebligis amuzvesperojn. Al la estinta prezidanto de l' Respubliko, D-ro Grinius, oni malpermesis paroli pri liaj memoroj de l' jaro 1905!

La ĉi-tieaj loĝantoj ne povas toleri la malbonajn vivkondiĉojn kaj elmigrado kreskas; dum januaro formigris 590 personoj, plejparte al Kanado, Brazilio kaj Argentino.

Parlamenton oni ne plu kunvokas depost fino de decembro. Oni faros tion "baldaŭ", t. e. eble neniam. La nova registaro projektas ŝanĝi la konstitucion. Kial? Al parlamento oni ne fidas. Laŭ la projektita konstitucia ŝanĝo, oni deziras malvastigi la rajtojn de parlamento kaj larĝigi tiujn de l' prezidanto; ekz., la ministraro estos responda al la prezidanto, ne al la parlamento, kaj la prezidanto estos elektata senpere de la popolo por 7 jaroj. Do, tia prezidanto fariĝos kvazaŭ reĝo. K-doj SAT-anoj, ĉu vi ne konas iun senlaboran reĝon por Litovio?

Unu el Multaj.

---

[1]) Litovaj naciistaj gazetoj asertas, kaj ankaŭ finnlandaj social-demokratoj opinias, ke en Litovio estas persekutataj nur komunistaj organizoj kaj, ke la nepolitikaj unuiĝoj kreskas kaj prosperas. Tiuj malprave informitaj personoj venu ĉi-tien kaj ili konvinkiĝos pri sia eraro.

LINGVAJ RESPONDOJ

(Plena Kolekto)

Unu volumo in-8, 92-paĝa **1.— mk. g.**

Multfoje petoj estis faritaj al D-ro Zamenhof, ke li klarigu kelkajn gramatikaĵojn aŭ lingvistikajn demandojn. Ĉiam li respondis bonkore. Pli ol 100 respondoj estis tiel faritaj de li, kaj estis iom post iom publikigitaj en *La Esperantisto* (1889—1893); *La Revuo* (1906—1908); *Oficiala Gazeto* (1911 — 1912). Ili aperas nun en tiu verko logike ordigitaj kaj kun devenaj referenzoj. Kvankam ili devas esti konsiderataj kiel oficialaĵoj, laŭ deziro de Zamenhof, konfesinde estas ke ili multe utilas al legantoj.

Havebla ĉe Administracio de SAT.

EL FRANCIO

Kreo de Kooperativa Kultura Centro en Parizo

Ni tro malofte legas raportojn pri konsumkooperativoj. Precipe pri ilia morala kaj kultura flanko oni preskaŭ neniam aŭdas. Tial mi opinias utile konigi la interesan iniciaton de kelkaj membroj de l' "Union des Coopérateurs" en Parizo[1]).

Sub aŭspicio de Federacio de Kooperativoj el la Pariza regiono, tiuj K-doj fondis en januaro "Edukan Komitaton", t. e. kooperativan centron de scienca, teknika kaj ekonomia kulturo.

Anstataŭ okazi en ĉambro, kie devige ili estas iom abstraktaj, la klerigaj paroladoj estas farataj de fakuloj ĉu en muzeoj, ĉu en industriaj entreprenoj ktp. Tiamaniere la faktoj prezentiĝas al la aŭdantaro tute konkrete, kaj pli memoreblaj estas la klarigoj.

La programo enhavas du ciklojn: 1e) historio pri la civilizacio, de la mond-origino ĝis nunaj tempoj; 2e) ekrigardo al la nuna civilizacio.

La parolad-vizitoj estas organizitaj laŭ tute racia plano. Pri la unua ciklo, ekzemple, oni pritraktis kaj pritraktos: en Pariza observatorio, la kosmon; en geologi-mineralogia muzeo, la formiĝon kaj konsiston de la tero; en naturhistoria muzeo, la paleontogogion kaj la rasojn; en prahistoria muzeo (St. Germain-en-Laye) la unuajn [illegible] en muzeo Louvre, la unuajn orientajn civilizaciojn ktp. Pri la dua ciklo, mi citu: rilate al urbanismo[2]), viziton ĉe grupo da laboristaj loĝejoj je malaltaj luprezoj kaj viziton ĉe higiena muzeo; vizitojn ĉe gasfabrikoj, ĉe elektra centro, ĉe metalurgiaj fabrikoj, ĉe modelaj teknikaj lernejoj ktp.

Venontan jaron, ĉiu ciklo havos duagradan instruon.

Tiu kultura centro planas ankaŭ starigi pli poste dokumentejon por la aŭtodidaktoj dezirantaj kompletigi sian scion je la socia, ekonomia kaj teknikaj vidpunktoj. Ankaŭ ĝi provos helpi la junulojn al profesia orientiĝo.

La kotizo estas malalta: 5 frankoj por ĉiu ciklo. Kompense la partoprenantoj ricevas resumon de la temo traktata dum la vizito, kun bibliografia noto pri ĝi.

Preskaŭ cent gekooperativanoj ĉeestas regule la vizitojn, kiuj okazas dimanĉon matene, ĉiu ciklo alterne. Tiu nombro, ja malalta kompare la nombron de kooperativanoj en la Pariza regiono, estas sufiĉa; eĉ kelkafoje oni devas aranĝi kelkajn grupojn, ĉar la regularoj de muzeoj kaj fabrikoj ne permesas tiom grandan aron da vizitantoj samtempe.

H. C. (24)

---

[1]) "Unuiĝo de Kooperativanoj", konsumkooperativa societo, kiu grupigas proksimume 73 000 anojn en Parizo kaj departementoj Seine, Seine-et-Oise, Seine-et-Marne kaj Oise. Ĝi posedas 43 viandbutikojn, 189 spicobutikojn en Pariza regiono kaj 41 en invaditaj regionoj, 12 restoraciojn, 1 kafejon, 1 fotografejan salonon, 5 libertempejojn ĉe maro kaj montaro, sume 292 establojn. En 1926, la vendsumo atingis preskaŭ 100 milionojn da frankoj.

[2]) Scienco aŭ teorio pri konstruado, aŭ ordigado de urboj. — *Red.*

Noto — K-doj kiuj tradukos la supran informon, bonvolu sendi n-on de la gazetoj, kiuj represos nacilingve al *H. Cachon*, 6, rue Pierre-Curie, Paris, Ve.

*

LETERO DE SENLABORA ENMIGRINTO

Kvankam la registaro kaj privatkapitalistaro bone sciis, ke okazos en la lando senlaboreco ĝi tamen venigis per siaj reprezentantoj en aliaj landoj sennombrajn milojn da eksterlandaj laboristoj por labori en franciaj minejoj, fabrikoj ktp.

Nun, laŭ oficialaj statistikoj estas 95 476 senlaboruloj. La subvencio konsistas el 6 fr. por tago, sed granda nombro *ne* ricevas ĝin. Por 6 fr. oni povas aĉeti 3 klgr. da pano... Ne estas mirinde, ke ĉiuj aziloj estas plenaj je senloĝejaj proletoj — kiuj rajtas resti tie nur tri noktojn! Cetere oni renkontas surstrate kelkajn senloĝejulojn dum la vintraj noktoj. Apud la Pariza parlamentejo mortis pro malsato pola laboristo, kaj poste hungaro. La konsuloj ne interesiĝas pri la proletoj! Ilia naciismo haltas antaŭ tia samnacianaro.

La sekvanta tabelo donos ian bildeton pri la proporcio da eksterlandanoj, kiuj troviĝas en Francio:

Provinco	*Francoj*	*Eksterlandanoj*
Ain	303.557	12.638
Aisne	452.276	36.723
Allier	364.828	5.734
Ardennes	266.666	30.782
Calvados	379.751	10.741
Marne	375.183	22.590
Haute Marne	187.536	7.834
Oise	377.590	28.381
Puy de Dôme	504.887	10.512
Bas Rhin	645.793	25.192
Haut Rhin	465.258	25.396
Rhône	930.763	63.152
Seine (Parizo)	4.204.853	423.784
Seine et Marne	356.393	23.624
Seite et Oise	1.053.584	83.940
Somme	455.277	18.689

En la supre-cititaj departementoj, troviĝas inter la eksterlandanoj plej grandparte poloj; ili laboras en minejoj por tre malaltaj salajroj, 19—25 fr. por tuta tago. Kiam la direkcio ne estas kontenta pri laboristo, ĝi lin maldungas, kvankam li venis laŭ kontrakto por tuta jaro! Ankaŭ la minej-kondiĉoj estas fiegaj; ĉiutage okazas akcidentoj — eĉ mortiĝoj ofte, antaŭ ol atingas la vunditon la kuracisto. Malsaniĝinto nekapabla labori ricevas 5 fr. por tago, sed nur se lia malsano daŭras pli ol dek tagoj.

Laboristoj ne venu Francion, se vi ne volas morti malsatante sur malvarma malmola strato.

Ch. F. M-H (eks- SAT.-ano)

La sekcio de scienc-laborantoj en Sovetio

Ĵus finiĝis la 2-a tutsovetia konferenco de Scienc-laborantoj. Ĝi sumigis la tutan laboron faratan dum la lastaj 3 jaroj, post la unua konferenco. La inaŭgura konferenco konfirmis ĉi sekcion, organizo, kiu estas unika en la tuta mondo, ĉar ĝi estas profesi-organizo de ĉiuj scienculoj kaj scienc-laborantoj — tute egale, ĉu ili instruas ĉe iu supera lernejo, ĉu laboras ĉe iu scienc-esplora instituto.

Dum la unua konferenco, la sekcio kalkulis en siaj rondoj 8000 membrojn; nun ĝi jam kalkulas 14 000. Ekster la sekcio troviĝas pro diversaj kaŭzoj (kiel ĉe aliaj profesisindikatoj) ankoraŭ 6000 personoj, sed ni povas esperi, ke baldaŭ ankaŭ ili aniĝos.

La sekcio laboris plejparte por materia plibonigo de l' kondiĉoj de siaj membroj, postulante ĉion, kion bezonas sciencularo, ĉe koncernaj ŝtataj institucioj. Kaj la rezultoj estas sufiĉe bonaj. La salajroj de profesoroj altiĝis rimarkinde kaj nun konsistigas — en RSFSR., por 6 horoj da semajna laboro (ordinare ili laboras pli multe, ekzemple en Blankrusio la meza daŭro estas 15 horoj semajne, sed proporcie plialtiĝas ilia salajro) — anstataŭ 48 rubloj en 1924 — 110 rubl., en Ukrainio — anstataŭ 73 — 168 rubl., en Blankrusio la koncernaj ciferoj estas — 77—100 rubl., en Azerbejdĵan — 100—180 rubl., en Kartvelio kaj Armenio — 45—72 rubl. Tiuj ĉi salajroj ankaŭ estas nesufiĉaj kaj la tasko de la sekcio estas, ilin konstante plialtigi ĉiurimede.

Rimarkinde ankaŭ plialtiĝis higieneja helpo por scienc-laborantoj. Dum la somero 1926-a estis lokitaj en ripozejoj kaj higienejoj 3860 personoj, el kiuj 75% estis scienc-laborantoj mem kaj 25% membroj de iliaj familioj.

Estis sufiĉe larĝe disvastigita ankaŭ kleriga laboro de la sekcio; ĝi estis farata laŭ du direktoj — laboro inter scienc-laborantoj kaj laboro de ĉi-lastaj inter vastaj laborulaj amasoj. Ĝis nun estas organizitaj en tuta Sovetio 13 "domoj de scienculoj", kie dum la liberaj horoj la scienc-laboranto povas ripozi kaj tralegi tiun literaturon, kiun ial li ne povas al si alproprigi, ekz. diversajn maloftaĵojn, eksterlandajn eldonaĵojn ktp.

Laborante inter laborulaj amasoj, sovetaj scienculoj organizas laboruniversitatojn, vesperlernejojn, lekciojn ktp. Ĉi lasta speco de laboro altiris al niaj scienculoj la atenton kaj la amon de laboristoj.

La sekcio de scienc-laborantoj eldonas sindikatan gazeton "Scienc-laboranto", kiu de aliaj similaj sindikataj organoj distingiĝas per seriozeco; en ĝi ni povas trovi kune kun profesiaj artikoloj, pure sciencajn artikolojn; en la gazeto kunlaboras la plej eminentaj membroj de la sekcio.

Dum ĉi tempo la sekcio per si prezentas fortan profesiorganizon, kiu tagon post tago plimultnombriĝas. Per sia bona laboro la sekcio faris, ke ĉiuj scienc-laborantoj jam en ĝi vidas sian veran propran organizon, kies aŭtoritato staras tre alte.

P. Kirjuŝin. (4424 Minsk.)



Laŭ-profesia konsisto de l' hungaria parlamento

Laŭ-profesie, la novelektitaj en 1926 parlamentaj deputitoj hungaraj, dividiĝas jene: Grandbienuloj, 43; etbienuloj, 13; ŝtataj, departementaj kaj urbaj oficistoj, 51; pastroj, 15; profesoroj, 11; inĝenieroj, 7; kuracistoj, 6; eksoficiroj, 10; instruisto, 1; verkistoj kaj ĵurnalistoj, 9; sekretarioj, 5; privat-oficistoj, 5; juĝistoj kaj prokuroroj, 4; advokatoj, 33; bankkaj entrepren-direktoroj, 13; dokumentoj mankas ĉe 19 personoj.

Jen la dividiĝo de la hungara parlamento laŭ partioj:

Nomo de partioj	Nombro de voĉdonoj	Nombro de delegitoj	Voĉdonoj en proc.	Delegitoj en proc.
Unueca (regist.)	1 000 076	171	59,1	69,7
Kristan-soc. . .	257 990	35	15,2	14,28
Soc.-dem. . . .	126 789	14	7,5	5,71
Maldekstra kaj demokrata .	94 900	9	5,7	3,67
Senpartia . . .	67 832	6	4,1	2,45
Ras-defendantoj	66 193	3	3,9	1,22
Kamparana . .	19 960	3	1,2	1,23
Krist.-opozicia . kaj legitimistoj	25 843	2	1,5	0,81
Sendependaj .	13 810	4	0,8	0,42
Etburĝa . . .	6 900	1	0,4	0,42
Terlaborista kaj laborista . .	2 073	—	0,0	—
Etbienula . . .	5 327	—	0,3	—
Diversaj . . .	4 764	—	0.3	—
Entute	1 692 457	245	100	100

Trad. el "Srocialismus" (Socialismo) SAT-ano *343*.



Statistiko pri la hungaria loĝantaro

Laŭ oficiala publikigo ni tradukas la jenon: Ĉi jare dum la dua kvaronjaro okazis 18 211 geedziĝoj. Por je mil homoj 8,5. Kompare kun la pasintjaro pliiĝo de 1,5 por mil, aŭ sume en nombroj pliiĝo de 2877 edziĝoj. Koncerne la naskiĝoj estas rimarkebla granda malpliiĝo. Dum la ĉijara dua kvaronjaro okazis 55 954 naskiĝoj, la malpliiĝo estas 3396. Pasintjare por ĉiu milo da homoj estis 28,7 naskitoj kaj ĉi-jare nur 26,9. Morte naskiĝis en 1926, dua kvaronjaro, 1663 idoj. Ĉi malfavoran staton nur parte kontraŭpezas la ciferoj de la mortiĝoj. Mortiĝoj okazis ĉi jare dum la pritraktita kvaronjaro 35 764 kaj dum la pasintjara samatempo 37 709 homoj. Inter la mortintoj estas kies aĝo estis sub la 7-a jaro: 11 802 kaj super la sepa jaraĝo mortis: 23 962 homoj.

La suĉinfanmortiĝo ankaŭ iom malpliiĝis. 1926 mortis 8883 suĉinfanoj (1925 dum sama tempo 9446). Sed multaj naskintoj mortis pro akuŝfebra malsano.

Pro tuberkolozo mortis 6290 homoj, por je mil homoj 3,0. La popolpliiĝo en 1926 dua kvaronjaro estas 20 190 homoj (1925 sama tempo 21 641 homoj).

Ge-Batta.

Sovetlandanoj!

Se vi petas respondon de la Administracio de SAT uzu la laste eldonitajn oficialajn poŝtkartojn de via ŝtato kun respondo.



Prikrima Muzeo

Sub la malnovaj arkaĵoj de Ivanov'a eksmonaĥejo en Moskvo, en du malgrandaj ĉambroj trovis lokon "Muzeo pri studado de krimoj kaj krimuloj".

La elmontraĵo estas plena je ŝtelistaj malŝlosiloj diversspecaj kaj amaso da tranĉiloj malsamaj por eltranĉado de poŝoj. Jen ligna revolvero — bone aspektanta kiel vera. Minace de ĉi-lignaĵo estis rabitaj kelke da kasistoj.

Sur tablo kuŝas albumoj kun bildoj de krimuloj; laŭ eksteraĵo la krimuloj estas preskaŭ nedistingeblaj de aliaj personoj. Junulo kun simpla kaj eĉ afabla vizaĝo estas nekorektebla krimulo; li mortigis kaj rabis ĉirkaŭ dekon da homoj.

Precipe estas interesaj "krima" gazetaro kaj literaturo: gazeto "Voĉo de l' malliberigito", gazetoj de malliberejo kaj literatura almanako de malliberigitoj en Soloveckije insuloj, en kies artikoloj oni sentas aspirojn al nova vivo kaj legas pri ĝeneralaj demandoj sociordaj.

Unu ĉambro de l' muzeo estas dediĉita al malnovtempa malliberejo. Ĉe la muroj kiel serpentoj zigzagas ĉenoj, pormanaj kaj porpiedaj katenoj, per kiuj estis alligataj al puŝĉaroj punlaborantoj. Artaj bildoj montras la malliberejan reĝimon en insulo Sahaleno kaj en la malliberejo de Nerĉinsk en cara tempo.

En la dua ĉambro estas kolektita materialo: fotoj, albumoj kaj modeloj de laboro de malliberigitoj, karakterizanta la reĝimon de sovetiaj malliberejoj. Porvirinaj mansaketoj faritaj el pano (?) alternas kun skribotabloj kverkaj tre delikate faritaj.

En sovetiaj izolejoj oni aŭdas, anstataŭ ĉentintado, movbrueton de maŝinrimenoj; enkarcerigitoj, trafante izolejojn kiel krimuloj, eliras kiel laboruloj. Preskaŭ ne ekzistas izolejo, kie ne estas klubo, teatro, sporta rondeto kaj lernejo por likvido de analfabeteco.

El "Komsomolskaja Pravda", n-o 297, esperantigis *A. Sidorov* (5458).

La laborista universitato de Charleroi (Ŝarlerua)

En la belga provinco Hainaut (Eno) ekzistas provinca konsilantaro en kiu la socialistoj havas la plimulton. Ĉi tiu fakto efektivigis la fondon de laborista universitato en Charleroi, kiel nur provincan, neniel nacian entreprenon.

En ĉi tiu bonega universitato, tute ne klasika, estas nun ĉirkaŭ 4500 lernantoj, sub la direktado de 300 profesoroj kaj laborej-ĉefoj. La studoj okazas dumtage kaj ankaŭ vespere kaj preparas la studantojn por ĉiaj industriaj karieroj, de kvalifikata laboristo ĝis inĝeniero.

La provinco Hainaut faras ĉion eblan por altiri la junan Laboristaron al la universitato, kaj sukcese. La instruado estas *senpaga;* eĉ la meztag-manĝaĵon oni ricevas senkoste plejparte kaj laŭ ĝusta prezo por tiuj, kiuj povas iomete pagi. La infanoj de l' popolo en ĉi tiu Nigra Regiono povas, se ili havas la necesajn kapablojn, sin levi al la plej altaj pintoj de la industria hierarĥio, per la helpo de la provinco.

Ne estas tut-enhava universitato; en ĝi oni traktas nur la teknikan flankon de l' vivo; sed almenaŭ ĝi estas laŭdinda entrepreno kiu meritas pri-scion kaj imiton en aliaj partoj de l' mondo.

Senpartiano.

Fundamento de Esperanto

Eldono kvinlingva (franca-angla-germana-rusa-pola) mk. g.
Unu volumo in-16 *(6a eldono)* 1.—

Eldono dulingva (franca-turka)
Du volumoj in-16, 80+126-pĝ., kune 0.40

Eldono dulingva (flandra-holanda)
Unu volumo in-16, 12+114-pĝ. **0.30**

Eldonoj: bohema, greka, hispana, hungara, itala, rumana
Ĉiu eldono (unu volumo) . . **0.30**

Eldonoj: armena, jud-hispana
Ĉiu eldono (du volumoj) . . . **0.30**

La Fundamento, kiun ĉiu esperantisto devas elkoni, konsistas el kvar partoj: 1. *Antaŭparolo,* kie la aŭtoro de esperanto, D-ro Zamenhof, montras la necesecon konservi kiel neŝanĝeblan bazon tiun verkon, absoluta kondiĉo por la unueco de la lingvo, kaj klarigas la kondiĉojn, en kiuj esperanto povos, sen rompo de tiu unueco, riĉiĝi iom post iom, per la alpreno de novaj vortoj aŭ formoj montriĝintaj necesaj; 2. *Fundamenta Gramatiko* prezentita tre koncize kaj klare en 16 reguloj; 3. *Ekzercaro,* zorge gradigita, kiu plenigas la gramatikon kaj montras ĝian aplikon; 4. *Universala Vortaro,* kiu entenas la 1800 esperantajn unuajn radikojn, kun traduko en kvin lingvoj, kiuj estis alprenitaj kiel bazo por la starigo de esperanto.

Grava rimarko. — Ĉar ekzistas tradukoj en multaj lingvoj, ĝi estas la sola metodo uzebla en kurso, kie la lernantoj parolas diversajn lingvojn.

Havebla ĉe Administracio de SAT.

La Ĵivaroj, "Kapo-Ĉasistoj" — sendependa popolo

Antaŭ kelkaj jaroj, blankuloj sukcesis penetri ĝis la fontoj de riverego Amazono kaj tie trovis la plej strangan primitivan popolon, la ĵivaroj, kiuj povis kvazaŭ sin barikadi kontraŭ iu konkirado. Ili do vivas *sendepende* en arbaroj, meze de marĉoj, atingeblaj nur per riveretoj tiom mallarĝaj, ke apenaŭ povas surveturi ilin barketo.

Ĉi-tiu popolo, nombrante ĉirkaŭe 25 000 anojn, estas kapoĉasistoj, kred-



antaj je akiro de forto per posedo de l' kapoj de venkitoj. Ĉi-kapojn la ĵivaroj prilaboras plej kurioze, eltrovinte rimedon por maldikigi ilin ĝis grandeco de oranĝo — tio nealiigante la trajtojn. La ostoj estas eligataj kaj anstataŭataj per varmega ŝtono. Per alia ŝtono la ĵivaroj "gladas" la haŭton ĝis ĝi kuntiriĝas en grandecon de l' ŝtono meze de l' kapo. Ĉi-tiun procedon ili ripetas kun pli malgranda ŝtono en la kapo kaj, post atingo de la dezirita rezulto, la trofeo estas perŝnure pendigata en la kabano de l' venkinto.

La ĉi apuda bildo montras laŭ kioma proporcio okazas la malpligrandigo.



NOTOJ

La tutmondaj mekanikaj fortoj

La mekanikaj motoroj (lokomotivoj, kurierŝipoj, aŭtomobiloj, motor-tiriloj, ktp.) havas grandan gravecon. Oni taksas ilian tut-mondan forton je 500 milionoj da ĉevalpotencoj. Ĉi-tiu nombro estas certe ne-preciza, sed ĝi sufiĉas por tio, kion ni deziras elmontri. Unu ĉevalpotenco, kiel oni scias, egalas la forton de 10 homoj. Tial, la 500 milionoj da ĉeval-potencoj, konsistantaj el la tutaĵo de motoroj ekzistantaj en la mondo, egalas la potencon de 5 miliardoj da homoj. Nu, la loĝantaro de l' terglobo nombras proksimume 1 miliardon 700 milionojn; se oni dekalkulas la infanojn, la maljunulojn kaj la kripligitojn, restas ne pli ol proksimume unu miliardo da personoj labor-kapablaj. Tial, la mekanika energio disponebla de l' homaro estas 5-foje pli multa ol la homaro mem, konsiderata kiel motoro.

Sed kiel ĝi estas dividita? La loĝantaro de Usono nombras apenaŭ 100 milionojn; tiu de l' resto de l' mondo nombras 1 miliardon 600 milionojn. La proporcio, do, estas 1 kontraŭ 16. Tial la 500 milionoj da ĉeval-potencoj estas dividitaj tiamaniere, ke la duono apartenas al Usono kaj la alia duono al la resto de l' homaro.



La tutmondaj rezervaĵoj de oro

Laŭ la lasta bulteno de l' Federacia Rezervaĵ-Konsilantaro (Federal Reserve Board) de Usono, la stoko de ora metalo en la mondo en 1925 konsistis el 9343 milionoj da dolaroj, kontraste al 5421 milionoj da dolaroj en 1913. La distribuado de ĉi-tiu stoko estas interesplena, ĉar ĝi ebligas ekvidi la alilokiĝojn, okazintaj depost la milito:

Landoj	1925	1913
	en milionoj da dolaroj	
Usono	2870	262
Francio	711	679
Anglio	703	170
Japanio	576	65
Hispanio	490	92
Argentino	436	225
Germanio	288	279
Italio	219	288
Kanado	203	143
Nederlando	178	61
Aŭstralio	165	22
Hindio (rezervo en rupioj)	109	73
Rusio	94	787
Svisio	90	33
Javo	73	10
Svedio	62	27
Urugvajo	57	11
Brazilio	56	53
Danio	56	20
Belgio	53	59
Sud-Afriko	44	40
Norvegio	39	13
Nov-Zelando	38	25
Ĉilio	34	?
Ĉekoslovakio	31	—
Rumanio	26	29
Polio	26	—
Egiptio	17	10
Jugoslavio	15	—
Hungario	10	—
Portugalio	9	9
Grekio	9	5
Finnlando	8	7
Bulgario	8	11
Aŭstrio (-Hungario)	2	251
Tutaĵo	9343	5421

SOKRATAJ MAKSIMOJ AL JUNULARO

1. Meditu malrapide kaj agu rapide.
2. Uzu viajn momentojn liberajn por aŭskulti la paroladojn de la saĝuloj.
3. Se vi okupas iun postenon gravan, zorgu bone ne doni oficojn iam ajn al malbonuloj; kaj kiam vi forlasos vian postenon, tion faru kun pli da gloro ol da riĉaĵoj.
4. Preferinda estas nescio ol multe da konoj nekompletaj, konfuze amasigitaj en la spirito.

SENNACIULA SPORTA PAĜO

En nova medio

SAT celas praktike utiligi internacian lingvon al la tutmonda Proletaro. Riĉhava estas la ĉeno de ĝiaj ĝisnunaj sukcesoj. Nun ĝi denove alpaŝas por disponi siajn servojn al nova medio. El ĉiuj fakoj de l' laborista movado, la sporto plej multe sentas la mankon de internacia lingvo. Jam de kelkaj jaroj la centrejoj de la lab. sportmovado konfesis tion, kaj malkaŝe laŭtigis siajn observojn sur ĉi-kampo kaj multaj decidoj pruvas sinceran simpation al esperanto. Precipe en lasta tempo tiaj elmontroj alprenis karakteron, taŭgan por instigi la esperantistaron prepariĝi al sintena laboro. Se la konjektoj ne trompas "Socialista Sportinternacio" (Lucerna) dum sia kongreso en Helsinki definitive akceptos nian lingvon, kaj ankaŭ "Ruĝa Sportinternacio" jam interrilatas kun konata SAT-ano por utiligi esperanton por siaj celoj. Tial certe ĉiuj SAT-anoj salutas la decidon de E. K. pri aperigo de sporta paĝo ĉiumonata. Por konformiĝi al la bezonoj de nia Asocio, tia paĝo devas havi du taskojn: Unue, ĝi servu al la tutmonda sportmovado laborista; due, ĝi estu ilo taŭga por varbi novajn anojn al SAT.

Por atingi la unuan celon necesas, ke ĉiuj sportspertaj K-doj disponu siajn scion kaj spertojn al la redaktanto de nia sportpaĝo. Lia tasko estos: zorgi por edukpova arangô de la sportartikolaro laŭ la senco de nia asocicelo. Tion ni atingos per lerta traktado de temoj koncernantaj internaciajn sportarangôjn, kaj per akcelado de la klopodoj por efektivigi unuecfronton sur sporta kampo. Niaj estontaj kunlaborantoj plej bone subtenos nin, se ili penas eviti polemikon kontraŭ la anoj de alia tendenco sportinternacia. La duan celon ni facile atingos, se niaj viglaj gazetkunlaborantoj ĉerpos el la enhavo de nia paĝo por la naciaj gazetoj, ne forgesante citi la fonton. Krom tio la ekzisto de tia paĝo jam per si mem sufiĉe bone pruvos la utilon de internacia lingvo. Tial kuraĝe al la laboro.

Taŭgan materialon oni sendu al la kompilanto de la sportpaĝo K-do Ad. Wendt, Leipzig O 27, Lange Reihe 11a.



Historio kaj evoluo de la sportmovado laborista en Germanio

Kiam, sekve de grandaj teknikaj eltrovoj (vapormaŝino kaj elektro), meze de la pasinta jarcento, industrio iom post iom anstataŭis metiistan produktmanieron, kun la plifortiĝo de la kapitalismo ankaŭ kreskis la klasa antagonismo. Naskiĝis la doktrino de l' socialismo, kaj ĝiaj adeptoj elpaŝis al vigla varbado por siaj celoj. Estas kompreneble, ke la nova ideo ankaŭ eniris tiaman gimnastikmovadon. Jam ĉiam la gimnastikuloj inklinis al liberecaj ideoj kaj, dum la 1848-a ribelo, ili kune kun studentaro staris sur la barikadoj, kie ili batalis por popola superregeco kaj, laŭ la tiama senco de l' revolucieco, por unueca kaj libera Germanio. Ĉi ribelemo, post fiasko de la revolucio, ankaŭ eniris fonditan en 1866 "Germana'n Gimnastikularo'n". Multaj kuraĝaj atakoj kontraŭ ŝovinismo kaj militemo aŭdiĝis el festparoladoj kaj gazetartikoloj de gvidantaj gimnastikuloj. Sed venis la german-franca milito (1870—71), kaj iam tre ribelemaj gvidantoj malkaŝis sian reakciulan internon. Venis 1878 kaj kun ĝi la atenco de la naci-liberalulo Hödel kontraŭ imperiestro Wilhelm I. Jen bona kaŭzo por venĝi sin kontraŭ malamataj socialistoj. Ankaŭ la gvidantoj de la gimnastika movado agordis la kanton kontraŭ la malamikoj de la patrio kaj postulis la t. n. "socialistan leĝon". En la unuiĝoj oni sisteme eksigis nekonvenajn personojn. Kiu konfesis sin al l' soc. ideo, tiu estis denuncita kaj punita per landomalpermeso. Pro progresanta reakcieco baldaŭ al laboristo ne plu estis eble aliĝi al gimnastika unuiĝo, ĉar oni simple ne akceptis "suspektindajn" personojn. Sed en 1890 ankaŭ la soc. leĝo falis abismen. Laboristaj klerigunuiĝoj jam intertempe estis fondintaj gimnastikajn sekciojn kaj nun ili abunde elkreskis. Je la 21. kaj 22. majo 1893 fondiĝis en Gera la "Germana Laborista Gimnastasocio", la hodiaŭa "Laborista Gimnast- kaj Sportasocio de Germanio". 39 delegitoj reprezentis 4000 membrojn dum la unua asocitago. En 1900, la asocio jam kalkulis 38 000 anojn kaj en 1914 ĝi atingis 187 000. Venis la mondmilito. 35 000 fidelaj anoj lasis sian vivon sur la patriota buĉejo, kaj je la fino de la milito nur restis 40 000. Sed la revolucio portis novan vivon en la vicojn; hodiaŭ la asocio nombras 560 000 membrojn. En ĝi oni praktikas ĉiujn sportmanierojn, k. e. novtempa gimnastiko, piedpilkludo, gimnastludoj, malpezatletiko, vintrosporto, naĝado kaj remado. Teknike la diversaj sportspecoj estas kunigitaj al spartoj: gimnastiko, gimnastludoj, malpezatletiko kaj vintrosporto formas la gimnastsparton, kun 74% el la membraro. 17% apartenas al la piedpilksparto kaj la restaj 9% al la sparto por akvosporto. Kvankam laboristoj ne posedas grandajn riĉaĵojn kaj ĝis la milito ne estis donataj komunumaj subvencioj, nun post la revolucio la konstruagado, spite inflacio kaj ekonomia mizero, estis tre vigla. Ekzistas 222 gimnasthaloj, 371 ludejoj kaj 52 banejoj kreitaj el propra forto.

La asocio mem posedas en Leipzig asocilernejon, kiu kostis 1¼ milionon da markoj. Ĝi estas kvinetaĝa kaj enhavas la administrejon teknikan, instruĉambrojn, dormĉambrojn, fotografan laborejon, restadejon por kursanoj, propran kuirejon, sportkuracistan konsultejon, gimnasthalon en amplekso de 21×28 m. kun moderna scenejo kaj naĝhalon. Ĉi instituto finkonstruiĝis en 1926.

Krom la lernejo la asocio posedas ankoraŭ tri domojn, konstruitajn en la jaro 1912; estas du loĝodomoj kaj unu administra domo. La administra domo enhavas la asocian eldonejon, kiu havas filiojn en 14 urboj de Germanio, kaj la asocian presejon, kiu estas ekipita kun modernaj kompost- kaj presmaŝinoj. La eldonejo presigas 6 asociajn gazetojn por la specialaj celoj de la spartoj kaj asocianoj. Por la konservo de la asocilernejo la ŝtato pagas po 30 000 gm. jare. Por la konstruado la ŝtato nur post kompleta pretigo cedis 200 000 gm. La burĝaj unioj ricevas ĉe ni jam pli grandajn sumojn, ankaŭ kiam ili ne jam tuŝis unu fosilon. La proporcio inter la subvencioj donataj al Laborista Gimnast- kaj Sportasocio kaj burĝaj Unioj estas 2:13.

Citindaĵoj el la asocia vivo estas: 1894, eldono de la unua kantaro "La libera gimnastikulo"; 1897, nomoŝanĝo al "Laborista Gimnastasocio" kaj, 1919, al "Laborista Gimnast- kaj Sportasocio". Fondiĝo de akcident-subten-kaso en 1895 kaj infanasekuro en 1919. La asocitago en Nürnberg 1899 decidis kiel unuecan saluton por la asocianoj la saluton "Frei Heil" (prosperon al libereca afero). En 1903, okazis oficigo de administranto kaj 1907, fondiĝo de la "Laborista Gimnasteldonejo". Por doni evolukapablecon al ĉiu sportspeco, la asocitago en Munĥeno, 1922, kreis la spartsistemon, kiu dank' al la konkordemo de la asocianoj garantias bonan prosperon al la Asocio.

(Daŭrigota.)

Se vi deziras profundiĝi en la materion de "Sennaciismo", vi nepre aĉetu kaj legu la 2-an eldonon de

A. B. C.
de Sennaciismo

Mendebla ĉe Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

TRA ESPERANTIO

NIA POŜTO

Fumio oka. — *Ni ne bone komprenas la sencon de via artikolo. Kaj ŝajnas, ke vi mem ne havas klaran ideon pri la celo k. taskoj de SAT. Ni do insiste ripetas, ke nia Asocio ne povas havi politikan programon, ne devas politike agitadi pri aktualaj problemoj. La politikaj partioj agitadas por akiri aŭ konservi la regadon. Tiucele, pro taktikaj konsideroj, ili povas, prave aŭ malprave, malobei la principojn, forlasi la rektan vojon k. zigzagi en kontraŭdiroj.*

La celo de SAT estas nur eduka, kleriga, informa. Sekve la tasko de la SAT-anoj en Ĉinio estas observi, pristudi k. informi pri la vivkondiĉoj de la tieaj laboristoj. Ili do, ekzemple, sciigu al la Legantaro de "S-ulo", ĉu la laboristoj estas pli aŭ malpli bone pagataj en la fabrikoj posedataj k. estrataj de ĉinaj mastroj, ol en tiuj posedataj k. estrataj ĉu de angloj, ĉu de francoj aŭ de usonanoj.

Kompreneble la eŭropaj SAT-anoj ne povas aprobi k. iel ajn subteni la registarojn, kiuj pretiĝas militi kontraŭ Ĉinio. Sed la ĉiniaj SAT-anoj ankaŭ devas kompreni, ke ia ajn nacia *sendependeco ne liberigos la proletojn je kapitalista ekspluatado.*

Sed necesas ankaŭ, ke ni ĉiuj komprenu, ke nia sennaciismo povas esti aplikata nur inter ni, nur en la kadro de SAT, nur inter laboristoj esperantistaj. Ni jam delonge skribis, "ke propagandi sennaciismon al neesperantistoj estus kvazaŭ instrui beletristikon al analfabetoj".

Nia opinio pri tio ne ŝanĝiĝis.

Sed ni aldonas, ke estu ankaŭ tute malsaĝe konsili al beletristikuloj, ke ili lernadu alfabeton. Ĉu vi komprenos? Eble ne. Tiaokaze necesos, ke pli larĝe, pli profunde ni priparolu la demandon. Red.

Anonimulo. (Japanio). — *Ni ne povas atenti pri anonima denunco. Bonvolu konigi al ni vian nomon kaj SAT-matrikulon. Cetere estus pli atentinda via plendo, se ĝi estus farita je la nomo de la SAT-anoj viaurbaj. Sed estas evidente, ke se ĝustas la de vi menciitaj faktoj, la koncerna K-do ne rajtas okupi la postenon.* E. K.

5236: *Bonvolu direkti vian proponon al E. K. Jes familianoj povas pagi la ½, sed en tiu okazo, ĉi lastaj ne ricevas jarlibron.* Adm.

BIS. *Tre ofte la Administracio kaj Redakcio de SAT ricevas plendojn kontraŭ K-doj, sin anoncintaj en la Koresponda Fako de "S-ulo", kaj tamen ne respondantaj al tiuj, kiuj skribis al ili. Tiu konduto estas ja ege riproĉinda. Sed nek la Adm. nek la Red. povas ion fari kontraŭ tiuj malseriozuloj. La interrilato kun korespond-petantoj estas nure privata afero. Cetere, ne ĉiuj korespondpetantoj estas SAT-anoj. Plendojn tiaspecajn ni pretas publikigi en la rubriko "Korespondado", se oni pagas laŭ la tarifo por anonco.*

8906: *Vi presigu anonceton en "Korespond-Fako". La administranto ne havas tempon por serĉi korespondantojn.* — Adm.

6954. — *Via interesa raporto estas tro longa k. specialtema por "S-ulo". Ni sendis vian manuskripton al la Red. de "S.R."*

Al Kelkiuj. — *La Red. de "La Lernanto" estas jam de kelka tempo en Barcelono, ne en* Paris.

Eksterordinara "Asocitago"

Dum Pasko (15.—18. aprilo) okazos en Leipzig eksterordinara Asocitago de "Laborista Esperanto-Asocio por la germanlingvaj regionoj". Ekstergermaniaj Esperanto-Organizoj laboristaj estas invitataj sendi reprezentanton. Loĝejo por tiuj reprezentantoj estos tute senpaga. Ĉiuj sendaĵoj rilatantaj tiun Asocian tagon estas adresendaj al: K-do Fr. Emmrich, Fichtestr. 102, Leipzig S 3.

Jubileo-Ĉeno[1])

Broz (Wien) 1 ŝil. aŭstr.; K-dino **Parnes** (Wien) 1 ŝil. aŭstr.; **Carle** (Wien) 1 ŝil. aŭstr.; **Hohenecker** (Wien) 1 ŝil. aŭstr.; **Kubitz** (Schweinfurt) 0,50 mk.; **Ŝlais** (Wien) 2 ŝil. aŭstr.; **Knourek** (Wien) 1 ŝil. aŭstr.; **Skugarevski** (Kazan) 0,75 rubl. alvokas ĉiujn SAT-anojn el Gomel, Reĉica kaj Kazan kaj ĉiujn miajn koresp-antojn. K-dino **Boxhammer** (Dresden) 1 mk.; alvokas Waronko (Odessa) kaj Ŝulgin (Iv. Voznesensk), A. Waronko (Odessa) SAT-aniĝu! K-dino **Alaŭdina** (Iv. Voznesensk) 1 rubl. alvokas S. Söderberg (Norrahammar); K-dino **Medvedeva** (Iv. Voznesensk) 1 rubl. alvokas siajn koresp-antojn el Orient-Saksio SAT-anojn: 5791, 1378, 6203 kaj 6168; **Wasserbauer** (Klosterneuburg) 3 ŝil. aŭstr.; **Pijetloviĉ** (Colombelles) 2 fr. fr.; **Schweinfurter** (Holleischen) 16 kr. ĉek.; alvokas K-dojn en Neumer, Holleischen kaj Plzen; K-dino **Beiermann** (Bielefeld) 0,90 mk.; **SAT-grupo** (Miĥajlovskij Hutor) 2 rubl.; K-dino **Limouzin** (Paris) 21 fr. fr.; **Soudant** (Athis-Mons) 2 fr. fr.; **Weber** (Untermenzing) 1 mk. alvokas ĉiujn siajn koresp-antojn, kiuj ne jam donacis; **Capoulade** (Cette) 5 fr. fr. invitas M. Müller (Chemnitz), Grigorjev (Armavir), Batrakov (Kurgan), Nikonov (Voroneĵ), Belvendz (Herne), Gineste, Jové, Diaz, Mailhac kaj Blanc (Cette) kaj ĉiujn SAT-anojn en Béziers; **Kletenik** (Rostov-Don) 5 rubl. laŭ invito de Bogdanov kaj invitas sekvi la ekzemplon jenaj K-doj en Rostov-Don: Bokarjov, Baranov, Barabanova, Paŝĉenko, Sidorov, Naumov, Ĉumakov, Fedotov; **Dobek** (Falkenstein) 1 mk.; **Friedrich** (Markranstädt) 2 mk. laŭ alvoko de Ĵeleznjakov (Sverdlovsk) alvokas Burkhard (Döhlen) kaj Irmler (Markranstädt); **Ŝustickij** (Velij) 1 rubl. laŭ alvoko de Bogdanov; **Killner** (Elberfeld) 1 mk. alvokas Adamson (Göteborg), Bosma (Amsterdam), Popov (Voroneĵ). **SAT-grupo** (Gross-Schönaŭ) 42,50 mk. kiel unuan partpagon; **Röbig** (Vjatka) 0,75 rubl. alvokas la K-dojn en Lisboa, Borell (Barcelona) kaj Gek-dojn Schnitzler-Bodet (Verviers). **Alalikin** (Vjatka) 1 rubl. laŭ invito de Kalaŝnikov, alvokas: Flejs, Smirnov, Strelkov, Ŝmidt, Dobrovolskij kaj Drjagin (Vjatka); **Skoropupov** (Ŝaĥty) 1 rubl. alvokas Fiŝer (Leningrad), Kudrjavcev (Novorossijsk); **Levenzon** (Ŝaĥty) 1 rubl. alvokas Gavrilov (Ŝatĥy); **Neĵjodov** (Ŝatĥy) 1 rubl. alvokas Malin, Flomin, Ĥlypalo, Talalajev (Ŝaĥty); **Nogin** (Ŝaĥty) 1 rubl. alvokas Borisov (Ŝaĥty), Zotov (Rostov) kaj Odincov (Jalta). **SAT-rondo** en Polio donacas 9,40 zl. k. alvokas ĉiujn poliajn lab. esp. grupojn imiti la ekzemplon. **Iu** (Paris) 38,50 fr. fr.

[1]) Vidu la n-ron 100 de "S-ulo".

KIO GRAVAS

al la "Esperanto-Servo" ŝajne ne estas de ĉiuj bone komprenata. Eĉ K-doj en landoj, kie ne estas okazo por eluzo de nia materialo, povas kaj precipe ili devas partopreni nian gazetservan laboron. Ili devas sendi surpoŝtkartajn raportetojn pri la vivo ĝenerala, pri specialaj laborkondiĉoj, neprogresemo de la laboristoj ktp. Ĉi ĉio tre gravas por nia peresperanta gazetservado.

Ekstereŭropaj

K-doj ankaŭ partoprenu nian Esperanto-Servo'n. Kial ĝis nun ne respondis la K-doj en la diversaj landoj ekstereŭropaj ricevintaj niajn materialojn? Helpu al ni fortigi nian aparaton kaj sukceso ne forestos. Senprokraste anoncu vin kiel reprezentanton de via lingvoregiono ĉe: Esperanto-Servo, Gerberstr. 24, Leipzig C 1 (Germanio).

PRI KOLEKTIVA PERESPERANTA KORESPONDADO

Kiam vi anoncas en *Sennaciulo* en la nomo de ia grupo aŭ organizo, al vi skribos preskaŭ neniu; sed kiam vi anoncas nur individuan korespondadon, vi akiros sufiĉe multajn korespondantojn.

Kial? Ĉu ni ĉiuj estas tiom individuemaj kaj tute ne deziras korespondi kolektive? Tute ne, la kaŭzo estas alia, ĉar kiam vi sendas leteron laŭ anoncita adreso de iu organizo, vi ankaŭ tre malofte ricevos respondon. Tiun mankon eble ĉiuj gvidantoj de esperanta laboro ekrimarkis. Neniu asertos, ke organizoj bone kaj baldaŭ respondas, neniu kontraŭdiros, ke ĉe la lastaj, dum semajnoj kaj monatoj kuŝas ricevitaj leteroj, vane atendantaj respondon.

Ni sukcesas ĉiam, kiam ni al iu laborista organizo proponas starigi per nia helpo korespondadon kun eksterlando. Ĉiuj laboristoj kaj oficistoj dum la kunvenoj, kie plejparte estas legataj niaj invitleteroj, entuziasme renkontas nian proponon kaj neniu voĉo — nek ĉe la estraro, nek ĉe la laboristaro — estas kontraŭ. Tio pruvas, ke la neceseco de l' laborista internacia interligo estas treege bezonata ĉe Laboristaro kaj neniu povas kontraŭstari ĝian deziron je senperaj interrilatoj.

Sed ni ne devas trankviliĝi, ekvidinte nian sukceson: la laboro efektiva, la peniga laboro, komenciĝas nur poste. La letero estas tralegita, ĉu sufiĉas? Ne, ĝi devas esti presata ĉie, kie ni povas tion fari: en muraj aŭ fabrikaj gazetoj, eĉ maŝinskribitaj en kelkaj ekzempleroj, fine-presita en profesiunuiĝa gazeto. Ĉiuj devas scii, eĉ laboristoj de aliaj fabrikoj, de aliaj urboj — ke iuj laboristoj komencis korespondadon kun eksterlando. Tio plej bone instigas, al verko de respondo kaj al tio, ke la aliaj laboristaj grupoj povas komenci la samon.

Sed vi plejparte vane atendas promesitan respondon; elektita komisio pro diversaj kaŭzoj ne kolektiĝas aŭ ĝi ne scias, kiel kaj pri kio skribi. Tiam esperantistaj perantoj mem devas verki la bezonatan respondon kaj ĝin montri aŭ tralegi al laboristoj; se ili konsentas, sendi ĝin.

Tie ĉi al mi povas kontraŭstari multaj protestantoj, kiel mi la kolektivan korespondadon anstataŭigas per preskaŭ individua kaj ĝin nomas kolektiva?

Jes, ĉiuj, kiuj efektive havas sperton en laborista kolektiva peresperanta korespondado, jam scias bonege, ke nia t. n. "kolektiva" laborista korespondado estas preskaŭ individua korespondado, kie unu aŭ 2—3 K-doj korespondadas en la nomo de siaj kolektivoj. Alimaniere la afero ne povas esti aranĝita. Nur tiuj K-doj klopodas pri siatempa respondo aŭ invitletero, klopodas pri enpreso de la leteroj en gazetoj, sialandaj kaj fremdlandaj, denove agitas per ĉi-gazetoj kaj bruas. La ceteraj laboristoj aŭskultas, legas kaj kun ni konsentas.

Per multaj kurbaj vojoj ni marŝas al la afero de l' kolektiva laborista korespondado. Nin ne timigu la severaj voĉoj de skeptikuloj kaj kritikuloj — ili plejparte ne laboris tiurilate. Nur post longaj monatoj kaj jaroj, post estonta ankoraŭ pli peniga kaj senlaca laboro ni povas sukcese starigi paŝo post paŝo *veran* kolektivan korespondadon.

P. Kirjuŝin, Minsk.

FERA GVARDIO DE SAT

"Fantastika romano..." Tiel nomis sian artikolon K-do Fedorov ("S-ulo" n-o 121 kaj 122). Ĉu vere ĉi-bona kaj jam delonge farenda entrepreno estas fantastika?

Ŝajnas al mi, ke ne.

Estas vero, ke ni, esperantistoj-laboruloj, malfacile povas sendi ĉiumonate po duono da usona dolaro. Sed ni ĉiuj bone komprenas, ke ni devas plej multe kunlaboradi al la SAT-movado por fortikigi kaj disvastigi ĝiajn atingaĵojn. Ni prikonsideru, ĉu multe povas nia Ekzekutivo fari per SAT-kotizo! Ĉi-lasta estas ja ridinde malalta.

Ni, laboruloj, kutimis streĉi niajn fortojn por nia komuna afero. Ni scias, ke plua sukceso de SAT-movado estas garantio por venko de nia proleta afero. Do, ni ankaŭ ĉi-tie devas streĉadi niajn fortojn. K-do Fedorov ja ne povas resti kaj ne restos sola. Mi esperas, ke multaj SAT-anoj imitos lian bonan ekzemplon.

Senprokraste mi sendas mian unuan "brikon" kaj faras "sanktan" ĵuron, sendi ne malpli ol dum tri jaroj 1 rublon (½ usona dolaro) ĉiumonate, sendepende de abonoj kaj mendoj. Kiel K-do Fedorov, mi ankaŭ ne estas riĉa aŭ facilanima homo.

B. Jeleznjakov (5583), Sverdlovsk.

Aliĝante al la alvoko de K-do Fedorov mi sendas miajn brikojn por la monatoj januaro, februaro kaj marto po 1 rubl. entute 3,— rubl.

L. Lvov (5763), Zinovjevsk.

*

KRONIKO

Britio.

London. — Parolis pri utileco de esp-o, *I. Flower*, antaŭ la anoj de l' Mile End Labor-Partio; ĉeestis 40 p. kiuj spontane esprimis deziron por starigo de esp.-kurso. Ĉe WEA (Lab Eduka Asocio) okazis debato pri tezo: "La lernado de esp-o estas malŝparo de tempo". Kontraŭ tiu tezo parolis K-do Sturmer k. subtenis lian vidpunkton la voĉdonado. La Lab. Esp. Klubo decidis aliĝi al NCLC (Nacia Konsilantaro de Lab. Kolegioj). La 5-a jarkunveno de la Brita Ligo de Esp.-Soc.-istoj (BLES) okazos en apr. 16. ĉe la Lab. Esp. Klubo, London. *(3398.)*

Ĉekoslovakio.

Praha. — Laborista esperantista unuiĝo aranĝis, 26/11. sian ĝen. kunvenon en la legejo de popoleduka institucio de la fervojista kooperativo. Partoprenis 50 personoj. Pri la signifo de SAT por proletaj esp-istoj parolis K-do *Hloupy*, kiu varme al ĉiuj ĉeestantoj rekomendis SAT-aniĝi. Lia propono, aĉeti ĉiujn eldonaĵojn de SAT estis aprobata. Nun la unuiĝo aranĝas du kursojn (35 part.). Estas uzata la lernolibro *Petro*. (4370)

Plzen. — Marton 6-an, okazis regiona SAT-kunveno, ĉe kiu i a. oni decidis proponi al LLE. intertrakti kun germ. lab. esp-societoj pri kuniĝo k. komuna laboro laŭ vere sennacieca tendenco, k. pri regula informado per bulteno de l' centro al ĉiuj delegitoj pri laboro en LLE. Ankaŭ oni decidis regule okazigi similajn SAT-kunvenojn por vigligi la movadon inter lab. esp-istoj ĉi-tie. (6734)

Francio.

Cette. — De jam 5 monatoj daŭris la kursoj, ĉe la esp. lab. grupo. La lern. ne estas multaj, sed seriozaj. K-do *Salan* gvidas la kursojn, vizitanta nian grupon unufoje monate; intertempe instruas K-do *Capoulade*. Jam en nia grupo, 6 K-doj SAT-aniĝis. *(6659.)*

Germanio.

Bremen. — 11. 2. 27 komenciĝis kurso (35 gelern.) aranĝita de la laboristkleriga kom. "Arbeiter-Bildungs-Ausschuss". Krome funkcias kurso kun 14 gelern. Ambaŭ gvidataj de instruisto *Gerke*, malnova k. fervora esp-pioniro. *(8848.)*

Hamburg-Altona. — La Prolet-Esp.-Grupo, kunvenante 13-12-26, decidis aliĝi al LEA. Komenc-jare stariĝis 6 esp.-kursoj kun ĉ. 100 lern. La grupo nombras nun 65, el kiuj verŝajne apenaŭ 25—30 estiĝis SAT-anoj! Sufiĉe multenombra estas la prolet-esp-istaro, kiu partoprenas k. subtenas la neŭtralan movadon. Ni penas gajni ilin por nia grupo. En la januara kunveno ni elektis en la estrecon la K-dojn H. Theobald, W. Behrmann, O. Fehse k. R. Dähne. Ĉiujn sendaĵojn direktu: K-do *Hermann Theobald, Hamburg-Altona*, Im Hag 5.

Leipzig. — SAT-militsekcio, *Leipzig*. La 20. feb. kunvenis esp-istoj, anoj de la Ruĝfront-Batalanta Asocio k. fondis grupon nomitan "SAT-militsekcio". Ĉeestis 22 K-doj, kiuj konsentis al la statuto presita en n-ro 113 de "S-ulo" k. elektis krom la grupa gvidanto, subgvidantojn por la urb-distriktoj Centro, Okcidento, Oriento. Taskoj de la 4 gvidantoj estas: 1. organizi la grupon, t. e. registri ĉiujn Ruĝfront-espistojn; 2. starigi kontaktojn kun ĉiuj unuopaj taĉmentoj de Ruĝfront-Batalanta Asocio en Leipzig; peri la korespondadon kun ruĝarmeanoj; 3. organizi kursojn inter anoj de la koncerna organizo ktp. Ĉion sendu al: *O. Bässler*, Gerberstr. 24, *Leipzig* C 1.

Jugoslavio.

Karlovac. — Ĉi-tie estas malfermita esp.-kurso de lab-istoj k. nur por lab-istoj. La 20 lern. estas diligentaj. Espereble post 2 monatoj, ni plimultigos la SAT-anojn. *6153.*

Latvio.

Riga. — La 2. feb., en ejo de 2-regiona socialdem. partio, komenciĝis esp.-kurso (35 lern.) k. la 16. feb. en ejo de 9-regiona socialdem. partio alia kun 6 lern. Ambaŭ gvid. K-do *A. Krastin*, laŭ "Petro". *6837.*

Sovetio.

Ĥarkov. — La ĉiutaga "Robitnica Gazeta *Proletar*", organo de Tutukrainia Sindikata Konsilantaro, de post la 9. 2, aperigas *kurson de esp-o* por ukrainlingvaj lab-istoj.

Kiev. — Por 1927, jam pagis SAT-kotizon 36 Kiev'aj K-doj. Feb. 7. junpioniro *Braginski* komencis novan esp-kurson kun 12 pioniroj. La 19. en Milita Komisarejo, K-do *Golovanevski* raportis pri: "Lab. klaso k. Intern. Interligo". Ĉeestis ĉ. 60 teritoriarmeanoj, kiuj multe interesiĝis pri esp-o. Kieva Distrikt-Komitato de Komjunularo oficiale komisiis K-don *Golovanevski* efektivigi interligon de Kievaj junkomunistaj ĉeloj kun la eksterlandaj per esp-o. La laboro estas komencita. En feb. ekfunkciis novaj esp-grupoj en Milit-Politika lernejo (13 lern.) k. en 3-a k. 4-a ŝtatmuelejoj (20 lern.); gvid. K-do *Golovanevski*. Loka radio-sendstacio disaŭdigis 3 raportojn de K-do *Egers* pri loka esp.-movado. Ĉe instruista sindikato ĉiusemajne funkcias esp.-rondeto. Gvid. K-do *Viktorov-Cehovic*. Jan. 30. k. feb. 5., okazis SEU-jarkunveno de Kievanoj. Post raporto pri la VI-a SAT-kongreso, k. pri la jara laboro, oni elektis por nova komitato: K-dojn *V. N. Devjatnin, B. Egers, T. Fedotov, M. Vail, L. Golovanevski, N. Koroljov* k. kiel kandidatojn, *Gr. Kagarlicki* k. *S. Vajnstejn*. *Sep. Duok.*

Kremenĉug. — La kurs-laboro sukcese progresas; nova esp-rondo fondiĝis ĉe fervojista klubo "Lenin" (35 lern. sub gvido de K-do *Goldfeder*). Rondoj por studi esp-on ankaŭ aperis en Fervojista Profesia Lernejo (tie dank'al K-do *Ŝlipper*, 9 K-doj SAT-aniĝis), k. jun-pionira taĉmento de l' infandomo n-o 5 (K-do *Saprovski*). Estas projektata fondo de kelkaj eksperimentaj rondetoj en kelkaj aliaj infan-grupoj. La loka ĉiutaga "Kremenĉugskij Raboĉij" dum jan-feb. enpresis 5 tradukaĵojn el esp. leteroj, 8 kronikaĵojn pri la loka peresp. korespondado k. laboro de esp. konsultejo. La loka esp. korespondejo speciale favore akceptas korespondaĵojn de ruĝfront-batalantoj, infan-grupoj, laboristinoj.

Leningrad. — 15-2-27 kunvenis 800 K-doj de medicin-laboristoj de *Vasiljeva insulo* (urbo *Leningrado*) por elekti 2 anojn al *Leningrada* soveto. Oni atentigis la kandidatojn pri la devigo por lernantoj studi unu eksterlandan lingvon, inter kiuj oni mencias esp-on. *Ja. Brukson (1896).*

Minsk. — Dum jan. en Blankrusaj gazetoj, aperis 52 artikoloj trad. el leteroj de eksterlandaj esp-istoj. Oficejo de I.L.I. komencas priservadi per materialo 15 novajn ne-blankrusajn gazetojn.

Omsk. — Organiziĝis esp-rondo en la milita klubo "Frunze" pere de 1 loka societo; kunvenoj dufoje semajne. Ankaŭ estas organizita senpaga esp-kurso por la klubanoj (22 gelern.). Gvidas K-do *T. Jevimov*. *J.*

Podroĵne (Kremenĉug-distr.). — En ĉi-vilaĝo nia K-do *Skirda* fervore ekagis por popularigi la mondlingvon inter kamparanoj. Ĉ. 60 Gek-doj (precipe junuloj) studas nun esp-on.

Smolensk. — Lastmonate en unu grupo de Kvara *Smolenska* 9-a-Jara Lernejo, je nomo de Komjunular-Internacio, estis enkondukata esp-o kiel aliaj sciencoj, sed por volontuloj. Lernas 30 Gek-doj. Krom tio, en lernejo funkcias rondeto (20 anoj). Malfeliĉe estas, ke ni ĝis nun ne trovis gekorespondantojn por nia lernejo. *(7193)*

Tver. — Komisiite de Agit-prop-Fako de *Tvera* Gubernia Komitato Kompartia, K-do *Varankin* disaŭdigis per loka radio-stacio raporton pri la agado k. aktualaj taskoj de *Tvera* organizo de SEU. En n-o 3 de organo de *Tvera* Gub. Kompartia Kom., aperis granda artikolo pri uzo de esp-o en internaci-interliga laboro de *Tvera* Kavaleria Lernejo. En klubo de tiu lernejo, 13-2-27, estis prezentata nova agitteatraĵo de *V. Varankin* "D. E." (Donu esperanton!). Ĝi estis ripetata ankoraŭ kelkfoje en lab. kluboj de l' urbo. Feb. 16. K-do *Kondrackij* raportis ĉe Fabrik-Region-Komitato de SEU k. ĉe Fabrikregionkom. de VLKSM, en la Lenina klubo de la teksfabriko. Kunvenis proks. 40 gelab-istoj, preskaŭ ĉiuj pioniroj, komjunuloj k. partianoj. Poste estis organizata en la klubo esp-rondo. K-doj *Kondrackij, Nikonov, Podsabijakin, Egorov*, de Fabregionkom. de SEU. konstante fervorege servas al nia komuna celo. Dank' al grandaj klopodoj de Fabregionkom. de SEU., ni jam havas du esp-ĉelojn en la fabriko, malgraŭ ke ĝi naskiĝis nur antaŭnelonge.

F. Oka.

Urunok vilaĝo. — Pli ol monaton en nia vilaĝo funkciis esp-rondo kunvenanta 3-foje en semajno, en kiu estas 15 komencantoj (terkulturistoj). Ĉiuj niaj vilaĝanoj interesiĝas pri la ronda laboro, ĉar ni komencas koresp.-on kun terkulturistoj el ĉiuj landoj. Interesajn leterojn ni presigas en ruslingvaj gazetoj. *(6279)*

Velij. — 20-3-27 la Velija SAT-societo festos sian unuan fondiĝ-datrevenon. La lasta jaro estis por ni tre sukcesa. La SAT-rondeto duobliĝis. Esp-on nun lernas 100 K-doj. Samtempe kun la festo estos aranĝita ekspozicio de jurnaloj, pk. il. eksterlandaj, ktp. *(6771)*

*

KOREKTO

En la Kroniko de n-o 125—126, bedaŭrinde enŝoviĝis eraro. Ni sciigis, ke la Kiev-aj K-doj vendis 600 kalendarojn kun esp-a gramatiko; la nombro devus esti 6000.

★ DIVERSAĴOJ ★

GRAVEGA URĜA PETO

La gazeto "Uralskij Raboĉij" (Urala laboristo) favore publikigis salutleterojn ricevitajn en esperanto el diversaj landoj, okaze de datreveno de l' oktobra revolucio kaj okaze de propaganda esperanta vespero. Ĉi-tio tre multe helpas esperantan movadon en urala regiono. Nun Sverdslovska distrikta komitato de SEU kaj SAT-grupo intencas organizi reciprokajn salutleterojn de proletaj organizoj, okaze de la unua de majo. Ĉi-salutleterojn ni publikigos ĝustatempe en diversaj gazetoj de Uralo kaj dum la festo tralegos antaŭ la amasoj de Laborularo.

SAT-anoj organizu la aferon! Ni nepre respondos same.

Pruvu utilecon kaj taŭgecon de esperanto!

Forĝu solidarecon de tutmonda Proletaro!

Adresu: U.S.S.R., *Sverdlovsk,* poŝtkesto n-o 174, Labinkor.

Komisiite, *B. Ĵeleznjakov. (5583)*

*

AL RADIISTARO TUTMONDA

En Kieva Societo de Radio-Amatoroj (KODR), enradikiĝis grupeto (pli ĝuste unu persono) da idistoj, kiu fuŝas la tutan laboron por internacia lingvo inter radiistoj. Nun ĉe la sama societo fondiĝas SEU-ĉelo, kiu havas la taskon per faktoj pruvi la praktikan preferindecon de esp-o super ido.

Atentante la gravecon de tiu tasko, kies sukcesa plenumo disponigas por esp-o ankoraŭ unu send-stacion, Kieva SEU-fako alvokas ĉiulandajn radiistojn-esp-istojn sendi al Kieva Radi-amatora Societo leterojn, gazetojn kaj ĉion, kio frape ilustras amasan aplikadon de esp-o inter radiistaro.

Ĉion adresu: "KODR.", por K-do *Vajnŝtejn, S.,* str. de Varovski, 14, *Kiev,* Sovet-Unio.

*

UTILIGU LA OKAZON

Dum pasko, 15—18 aprilo, okazos en *Erfurt* (Germanio) regnokonferenco de la "Internacia Laborista Helpo". Okaze de la konferenco oni aranĝos grandajn manifestaciojn. La adreso estas: Sekretariat der "Internationalen Arbeiter-Hilfe", z. *H. Paul Schäfer,* Schwerinstrasse 7, *Erfurt,* Germanio.

Gek-doj tutmondaj, sendu salutojn esperantlingvajn kaj deziresprimojn pri esper-anto kiel eble plej en nomo de iu ajn organizo al ĉi supra adreso, por ke ni deĵoru kiel interpretantoj. *SAT-ano 6876, (Erfurt).*

*

ATENTU!

Ĉiulandaj Komjunulanaroj, Junaj-Pioniroj, Laboristaj kluboj kaj rusaj Ruĝarmeanoj. Dum la Paskaj tagoj (17—18 aprilo 1927) estos la tutgermana komjunulara kunveno en Hamburg (Germanio) kien alvenos la komjunularanoj el ĉiuj lokoj de Germanio.

Gek-doj, sendu salutaĵojn (se eble stampitajn) de viaj kluboj kaj ĉeloj. Montru, ke nia SAT-aparato servas. Junular-Perantoj, instigu viajn Gek-dojn forsendi la salutaĵojn ĝustatempe. Sendu ankaŭ ekspoziciaĵojn, murgazetojn, broŝurojn, flugfoliojn ktp.

Eŭropanoj, forsendu ĉirkaŭ 10—12 tagoj antaŭ Pasko. Adresu: K-don *F. Köhnke, Hamburg 19,* Sartoriusstr. 22, Germanio.

PRI GIMNASTIKA OLIMPIADO EN PRAHA

Partoprenontoj skribu al K-do: Hloupy, E. Praha VII — Štitného strato — 958 Ĉekoslovakio. De nun ankaŭ ĉiujn korespondaĵojn, kiuj koncernas la esperantan fakon de Olimpiado, estu al li sendataj. Se vi sendus ion laŭ malnova adreso, respondo ne estas garantiata.

La Lingva Angulo

Demando:

Pli kaj pli oni uzas, precipe rusiaj K-doj, la esprimojn laborulo, laborularo *k. s. Ĉu ne estus pli bone uzi la pli logikajn formojn* laboristo, laboristaro *k. s.?*

— 670.

Respondo:

La formoj kun IST estas pli ĝustaj kaj jam nun multe pli ofte uzataj, kio estas grava en la lingvaj demandoj. *Fakulo.*

Pri tiu demando ni korespondis kun Fakulo kaj rimarkigis, ke la vorto LABORISTO iel entenas aĉigan sencon. Tio montriĝas en la fakto, ke al laboristo oni pagas "salajron", dum advokato, profesoro kaj similuloj ricevas "honorarion". En Sovetio, kie ekzistas socia sistemo laŭ kiu, principe, regas la laboristoj kaj kamparanoj, kredeble la tieaj esperantistoj, konscie aŭ ne, opinias, ke ne taŭgas la vorto laboristo por difini la kategorion de homoj pri kiuj ili parolas. Pro tio ili do eble preferas uzi la formon LABORULO, kiu povas rilati same bone al urbano, kamparano, advokato aŭ profesoro.

Al tiuj niaj rimarkoj respondis *Fakulo* jene: "Mi volonte konsentas vian bonan pravigon pri la formo LABORULO, sed necesas interkonsenti, ke ambaŭ formoj (laboristo, laborulo) ne povas esti uzataj kun la sama signifo. Gramatike ne ekzistas aĉiga senco en la sufikso IST . . ."

Ni do povas daŭrigi la uzadon de la formo LABORULO, donante al ĝi tre larĝan sencon. Ĉiuj homoj, kiuj faras utilan laboron, ĉu masonisto, ĉu profesoro, povas esti nomataj laboruloj.

Kaj ankoraŭ unu rimarkon: Kiam fakte regos la Socialismo en la mondo, forestos la salajrosistemo kaj sekve la vortoj laboristo, salajro, honorario havos nur historian signifon . . . *Red.*

PETRO KURSA LERNOLIBRO
II. Eldono.

Korektu preserarojn:

pĝ. 6, lin. 15: anst. kompletivan — komprenivan.
pĝ. 13, lin. 15: anst. horaj — horoj.
pĝ. 14, lin. 5: anst. frukto — fruktoj.
pĝ. 21, lin. 8—9: anst. tridekvin — tridek kvin.
pĝ. 26, lin. 2, 10, 14, 17, 19, 20, 21, 27, 33 kaj
pĝ. 27, lin. 29: anst. majstro — mastro.

*

Korekto

La artikolo "pri barbaraĵoj en Sovet-Sibirio", kiun koncernas kolektiva protesto de irkutskaj SAT-anoj, presita en n-o 123/124 de "S-ulo", aperis en n-o 111 de "S-ulo", sed ne en n-o 3 de "S-ulo" kiel erare oni presis en la responda artikolo de la irkutskanoj.

M. Krjukov.

*

MEMORNOTO

Represis el "Sennaciulo".

Le Cri du Peuple, Lyon-Nimes, 26-2-27: "Vartejo en Kremenĉug" (123—4). — *La Provence,* Nimes, 26-2-27: "Vartejo en Kremenĉug" (123—4). — *Norges Kommunistblad,* Oslo, 14-1-27: "El la demokratia Aŭstrio" (118); 29-1-27: "Ĉe la estontularo" (119—20); 2-2-27: "La nuntempa Ĉinio" (118). — *Krasnij Nalstuk,* Orel, 13-2-27: "Blankaj mastroj — flavaj sklavoj" (119—20). — *Arbeiter-Zeitung,* Frankfurt, 11-2-27: "Oficiala protekto de esperanto en Britio". — *Le Drapeau Rouge,* Bruxelles, 13-11-26: "Fizik-kulturo en USSR" (107); 30-11-26: "Kion ricevas aŭstria laboristo" (108); 3-12-26: "Notoj el Norvegio" (112); 6-1-27: "Senlaboreco en USSR" (108); 25-1-27: "El Japanio" (119—20); "El Germanio" (119—20); 3-2-27: "La Senlaboreco en Polio" (118); 2-2-27: "El hispania vivo" (118); 3-2-27: "El Svedio" (121—22). — *Neue Zeitung,* München, 2-3-27: "K-do Stefan Nemeth mortis en hungaria malliberejo". — *Le Travail,* Verviers, 8-12-26: "Homvendo en Eŭropo" (108); 19-12-26: "La Pekinaj ĝin-rikŝoj" (108); 16-12-26: "La soc. demokratio en Aŭstrio" (115). — *Le Peuple de la Loire,* St. Etienne 23-1-27, 1-2-27: "Homvendo en Eŭropo" (108). — *L' Effort,* Lyon, 15-2-27: "Nova kodo pri edziĝo en USSR" (103); "Hispania reakcio kaj instruado" (106); "El Oriento" (105); "Klasa justeco" (119—20). — "La Pekinaj ĝin-rikŝoj" (108); "El Bulgario" (112); "Formigrado el Hungario" (110); "El Bournemouth distrikto" (112); "Sciigoj el Norvegio" (112); "Kion povas aĉeti aŭstria laboristo" (108). — *The Shop Assistant,* Britio, 19-2-27: "La stato de junlaboristoj en Jugoslavio" (119—20). — *Le Combat,* Bruxelles, feb. 1927: "Kio okazis en Nederlanda Hindio?" (117).

Presis el SAT-Informservo.

Le Drapeau Rouge, Bruxelles, 2-2-27: "Fordono de pastra rango" (121—22); 3-2-27: pri norvega elmigrado kaj alkohol-konsumado en Germanio. —

Enhavas notojn pri SAT.

Voorwaarts, Rotterdam, 17-2-27: bildo de VI-a Kongresaj poŝtmarkoj. — *The Daily Herald,* London, 25-2-27: mencio pri "Karl Marx: lia Vivo kaj Verko" kaj pri "S-ulo" de Mark Starr. —

Enhavas priesperantajn artikolojn.

Krasnij Nalstuk, Orel, 28-1-27. — *Le Populaire,* Paris, 25-1-27, 4-2-27, 6-2-27. — *L'Emancipateur,* Bourges, 23-1-27, 30-1-27. — *Neue Zeitung,* München, 27-2-27: kurs-anonco. —

Enhavas tradukaĵojn el esperantaj Leteroj.

Le Cri du Peuple, Lyon, 29-1-27, 5-2-27. — *Le Syndiqué du Centre,* Bourges, jan. 1927. — *L'Effort,* Lyon, 1-3-27: 5 artikoloj de Prolet-Inform. de FEO. — *Molot,* Rostov, 18-2-27, 23-2-27. — *Arbeiter-Zeitung,* Leipzig, 21-2-27 (2).

NEKROLOGO

Post longa, 5-jara suferado, mortis la 10. 1. 1927 mia kara vivamikino kaj SAT-anino n-ro 7107 K-dino

Tatjana Lorentson

Honoron al ŝia memoro! (1929)

KORESPONDADO

TARIFO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, k. ĉ. l. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Belgio.

K-do *Houben, Ad.,* Kemmelbergstr. 3, Berchem, *Antwerpen,* p. m., p. k. il., bildflanke.

Britio.

— Gek-doj k. alilanduloj, kiuj vizitos Anglion, bonv. informi la sekretarion de "Lab. Esp. Klubo". 114, Duke St., Stretford Rd., *Manchester* pri sia alveno.

Ĉekoslovakio.

K-do *Václav Fischer, Neumèr, 34, p. Holyŝov ap. Plzen,* dez. koresp. pri ĉ. temoj kun Gek-doj, L, PI, k. ĉ. l.

K-do *Václav Ŝuh, Neumèr, 19, p. Holyŝov ap. Plzen,* dez. koresp. kun ekstereŭropanoj, L, PI.

Francio.

K-do *Meyer, Victor* (ŝutranĉisto), 16 rue de Bonale, *Lyon VII,* kun samprofesiuloj en Krimeo.

K-do *Marcel Roux,* 90 rue Boilcau, *Lyon VI* (Francio), propagandcele petas K-dojn el USSR sendi murgazetojn esp. aŭ ruslingvajn eld. de kluboj, ĉeloj ktp. Repagos elspezojn.

Germanio.

K-do *Gustav Boll,* (librobindisto) Sprendlinger Landstr. 224, *Offenbach a. M.* dez. koresp. pri meti- k. lab. temoj.

K-do *Robert Flemming,* Lohestr. 20, *Breslau,* dez. koresp. pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

K-do *Albert Stern,* Bahnstr. 31-a, *Stuttgart-Untertürkheim,* dez. koresp. k. ĉ. l. PI, L.

— Ruĝaj help-organizaĵoj aranĝos la 10. de aprilo distrikt-konferencon en Orient-Saksio. Sendu salutskribaĵon! Interŝanĝo de raportoj k. materialoj estas dezirata. Adr.: *Kurt Reichert,* Hendrichstr. 14, pt., *Klotzsche b. Dresden.*

K-do *Paŭlo Hennig,* Schulstr. 25, *Papitz ap. Leipzig,* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

K-do *Friedrich Rau,* Löwengasse, 3, *Nekkarsulm (Wttbg.),* dez. koresp. nur pri homeopatio.

K-do *Hans Mischewski,* Gerlachstr. 96-k, *Königsberg i. Pr.,* pri div. temoj nur kun ekstereŭropanoj. Resp. nepra.

K-do *W. Balczun,* Kapornerstr. 9-a, *Königsberg i. Pr.* pri ĉ. temoj k. ĉ. l., pref. kun Anglio k. Francio.

— Esp. grupo dez. koresp. pri ĉ. temoj, k. ĉ. l. Resp. akurate. Adr.: *K-do W. Balczun,* Kaporner Str. 9-a, *Königsberg i. Pr.*

K-do *August Kienhöfer,* Engelgasse, 5, *Schwäbisch-Gmünd,* petas terkulturistojn de Usono k. Sud-Ameriko pri sciigoj rilate terekonomio k. kondiĉoj ĉe enmigrado.

— Lab. Esp. Grupo-Mannheim, dez. kolektive koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l., interŝ. esp-aĵojn. Adr.: *Württ. Hof,* G. 5, Nr. 3, *Mannheim.*

Stratŝanĝo: K-doj *Paul* kaj *Fritz Nixdorf,* loĝas nun: Horsthausener Str. 38, *Herne i. W.*

K-do *Alfred Ziegler,* Röderichstr. 49, *Frankfurt a. M.-Rödelheim* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. L, PK, PI. Resp. certe.

Nova Adreso: K-do *R. Mahns* nun loĝas *Berlin-Reinickendorf,* Gen. Barby-Str. 104-a. Dez. koresp. k. interŝ. PM kun Sovetio.

— Lab. Esp. Grupo-Lunzenau, dez. koresp. pri ĉ. temoj, interŝ. gaz. k. ĉ. l. Adr.: K-do *Fritz Kramer,* Altenburger Str. 93, *Lunzenau (Mulde).*

K-do *Arno Paul,* Thür. Sparkasse, *Zeulenroda,* sendas artpoŝtkarton kontraŭ urbvidaĵkarto, precipe kun Sovet-Azio.

K-doj *Anton Lang* kaj *Walter Winkler,* Lonza-B. II./40, *Waldshut i. Baden,* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. L, PK, PI. Certe resp.

K-do *H. Vogel,* Fichtestr. 17, *Chemnitz i. S.,* dez. koresp. pri korpkulturo k. nudkulturo kun bildoj k. ĉ. l. Nepre resp.

K-do *Oskar Preusser,* Kl. Ulrichstr. 3, III., *Halle a. S.,* dez. koresp. pri ĉ. temoj, precipe pri la metalbranĉo, k. ĉ. l.

Hispanio.

— 9 junaj K-doj dez. koresp. kun italaj, ĉekosl. germ. k. rusaj Gek-doj aŭ SAT-grupoj pri lab. temoj. Resp. garantiata. Adr.: *A. Rodriguez,* San Vicente-E., *Baracaldo (Vizcaja).*

Sovetio.

— Gejunula grupo dez. koresp. k. ĉ. l. pri ĉ. temoj. Adr.: K-dino *Peskovskaja,* Centr. Raboĉ Biblioteka, ul. Trockogo, 64, Odessa.

— *Germanlingvanoj!* Sendu germanlingvajn gaz. kaj ĵurnalojn pri Radio k. agrikulturo por germ. vilaĝo. Interŝanĝe vi ricevos samajn ruslingvajn aŭ sov. PM. Resp. certa. Adr.: *Odessa,* Dolnickaja, 42, II. Goskoĵzavod. Zavkom.

K-do *S. P. Gornostaev,* str. 10 Aŭgusta, 77, *Ivanovo-Voznesensk,* dez. koresp. k. ĉ. l.

K-do *V. K. Lehkov,* Ŝujskaja-gorod, 7/7, *Ivanovo-Voznesensk,* dez. koresp. k. ĉ. l.

K-do *G. Artemjev,* Poŝtkesto, 2, *Nalĉik,* pri politikaj, laboristaj, sociaj k. pedag. temoj k. ĉ. l., prefere kun Azio, Aŭstralio, Ameriko, Afriko k. Proksima Oriento. Ĉiam resp.

— Junulkomunista grupo de 10-a uzinkomitato de metalistoj, dez. koresp. k. ĉ. l. junulkom-istoj pri lab. vivo. Adr.: *Jaĉejka VLKSM,* 10 zavkoma metallistov, Rogoĵsko-Simonovsk. Rajona Uljanovskaja, 65, *Moskvo.*

K-do *Josefo Karantbajvel,* (inĝeniero) B.-Gnezdnikovskij, Nr. 10, kv. 228, *Moskvo,* dez. koresp. kun tutmonda K-daro pri moderna arkitekturo k. interŝ. fotojn k. ĵurnalojn pri konstruarto. Speciale dez. ricevi prospektojn de konstrufirmaoj.

K-do *F. Markelov,* (poŝttelegrafisto) Poŝtkontoro, *Buzuluk,* Samara gub., dez. koresp. pri ĉ. lab. temoj k. ĉ. l. PI, PM, PK.

Adresŝanĝo: K-do *I. Lidin* (ĵurnalisto), Poŝtkesto, 630, *Moskvo,* (antaŭe en Kazan).

— Militpolitika lernejo dez. koresp. kun ruĝfront-batalantoj, sportuloj ĉiulandaj. Adr.: V. P. Ŝ. (vojenno-politiĉeska ŝkola), dla krujka Esperanto, *Kiev.*

K-do *Jak. Avrunin,* (jun. kom.) Puŝkin-str. 37, *Kremenĉug,* pri ĉ. temoj k. ĉ. l. (precipe polit. temoj), L, PK, PM. Resp. garant.

K-do *S. Hercik,* Volodarskaja, 18, *Stalingrad,* pri div. temoj preferinde pri lab. k. esp. movadoj, interŝ. PM, PI, ilust. ĵurnalojn.

K-do *I. Carovski,* Bazarni, pr. 1, 22, *Kiev,* dez. koresp. k. ĉ. l. L, PI, PK.

K-do *V. Ponomarenko,* (19 j.) Distancia, 52/118, *Odessa-Tovarnaja,* dez. koresp. k. ĉ. l. pri ĉ. temoj L, PI.

— Labesko en Odessa serĉas koresp-antojn el ĉ. l. pri lab. vivo, sindikata, virina, junula, pionira movadoj. Pri strikoj, kongresoj, konferencoj laboristaj, viv- k. lab-kondiĉoj, salajro, lernej-aferoj, lab. lernado, senlaboreco, sociasekur-kooperat., kluboj ktp. Resp. garantiata. Adr.: K-do *S. Gelrud,* Kniĵnij per 3, *Odessa.*

— *Grupo Esperantista,* Krasnaja, 32, *Krasnodar,* dez. koresp. k. ĉ. l. L, PK.

K-do *Ilĉjo Kalinin* kaj *K-do Levin A., Oranjerejnoje,* Astrahanskoj gub., dez. koresp. k. ĉ. l. ge-esp-istoj. Interŝ. L, PK, belajn bildojn k. a., ĉiam resp.

K-do *V. Korjov,* Vredenska-str. 30, 4, *Kiev,* dez. koresp. k. ĉ. l.

K-do *Kacnelson,* Andreejevska-str., 11, 5, *Kiev,* dez. koresp. k. ĉ. l.

— Pafist-sportula rondeto, dez. koresp. kun paf sport. organizaĵoj. Adr.: *Kiev,* Jurkovska, 22, *Zavkomu dla strelkovogo krujka.*

— Esp. rondeto ĉe junkom-ista klubo, dez. koresp. k. ĉ. l. Adr.: *M. Vail,* Bratska, 11, 9, *Kiev.*

K-dino *Tanja Kanevska,* Pirogovska, 47, 12, *Kiev,* k. ĉ. l.

K-do *I. Kotlar,* (junkom-isto), Bibikovski, 19, 3, *Kiev,* k. ĉ. l.

K-do *Sp. A. Budanov,* Panskaja, d. b. Pavlova, Ĵilkollektiv, 1, *Ivanovo-Voznesensk,* dez. koresp. k. ĉ. l.

Usono.

Adresŝanĝo: K-do *Karl Fröding,* 602, Seventh St. *Rockford,* (Illinois), deziras koresp-antojn pri naturkuracado, etnografio, lingvoscienco. Speciale el ne-eŭropaj landoj.

SOVETLANDANOJ ATENTU!

K-do *Gustav Jäckel* (elektroteknikisto), *Bad Schlag, Nr. 52,* ap. Gablonz a. N. (Ĉekoslovakio) dez. akuratan koresp-adon pri labor- kaj vivkondiĉoj en via lando. Resp. garantiata.

PETO

Du K-doj esp-istaj, razisto kaj ŝuisto, serĉas laboron, ili ambaŭ estas pretaj elmigri eksterlanden, plej volonte al Sovetio, Usono, Kanado aŭ Sud-Ameriko. Ni ankaŭ pretas fari alian laboron. Ni estas edziĝintaj. K-dojn, kiuj donos al ni bonan informon, ni laŭeble rekompencos. Adr.: K-do *Josef Buka,* ulice 28, října, strato de 28 oktobro, 1094, *Nymburk* (Ĉekoslovakio).

INSTRUISTOJ
via gazeto estas
INTERNACIA
PEDAGOGIA REVUO

oficiala organo de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE)

Gazetabono: 2,50 mk. g.

Kotizo al TAGE: 0,50 mk. g.

Specimenon petu de **M. Goldberg,** Frohburger Str. 68, p., Leipzig S3 (Germ.)

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)